



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報通

6

1972



Ĝaŭ Pujū (la dekstra) helpas Vang Jakin en lerno de la nova metodo de akupunkturo (legu la artikolon *Ekparolas Surdmutuloj* en ĉi tiu numero)

Ekparolas Surdmutuloj

EN nia lando, parolante pri nefareblaj aferoj oni ofte diras: “Tion oni povus fari, se surdmutulo ekparolus” aŭ “se fera arbo ekflorus”. Sed en la Granda Proletara Kultura Revolucio, multaj aferoj antaŭe rigardataj kiel nefareblaj jam estis faritaj. Sanitaristo Ĝaŭ Puju de Ŝenjang-a trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la kuraca taĉmento, en kiu Ĝaŭ Puju laboras, redonis parolan kapablon al surdmutuloj kaj kreis sukcesan sperton en kuraco de surdmuteco.

Kiel ili sukcesis kuraci surdmutecon antaŭe rigardatan kiel “nekuraceblan malsanon”?

En marto de 1968, kune kun arma kuraca taĉmento, Ĝaŭ Puju venis al la Surdmutula Lernejo de Liaŭjuan, kiu troviĝas proksime de la garnizonejo, por kuraci la lernantojn. Veninte en la lernejon, ili tuj estis ĉirkaŭataj de multaj surdmutaj geknaboj. Knabino Vang Jakin tiris Ĝaŭ Puju kaj malfermis la *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*. Ŝi montris al Ĝaŭ Puju la portreton de Prezidanto Maŭ kaj sian buŝon per la fingro kaj eligis “a... a...”, por esprimi, ke ŝi volas krei “Vivu Prezidanto Maŭ”. Tamen ŝi ne povis krei kaj larmis pro ĉagreno. Ĉe tio ankaŭ Ĝaŭ Puju larmis. En lia brusto arde brulis la klasa sento de revolucia batalanto. Li pensis, ke en la infera malnova socio, la laboranta popolo estis subpremata en la plej malsupra tavolo kaj ne havis la rajton libere paroli, kvankam ili havis buŝon. En la nova socio, la laboranta popolo fariĝis mastro kaj povas libere paroli kaj kanti, tamen la surdmutuloj ne povas ĝui tion. Sekve, liberigi ilin el la sufero kaj helpi ilin diri kion ili volas, estas nerifuzebla tasko por revoluciaj medicinaj laborantoj. Ĝaŭ Puju

faris en si la decidon, ke li nepre klopodos kune kun la aliaj kamaradoj de la kuraca taĉmento por resanigi la surdmutajn lernantojn per akupunkturo.

La informo, ke la ĈPLA-a kuraca taĉmento venis kuraci surdmutecon, rapide disvastiĝis kva-zaŭ printempa zefiro tra la tuta urbo Liaŭjuan. Oni ĝoje diris unu al alia kaj esperis, ke en iu tago surdmutuloj ekparolos.

Sed iuj aliaj diris kun dubo: “Ni neniam aŭdis, ke akupunkturo povas kuraci mutulon!”

Ĉu surdmutulo vere estas nekuracebla? Ĝaŭ Puju kaj liaj kolegoj decidis fari profundan esploron pri tio. Antaŭ ĉio ili faris detalajn kaj profundajn enketojn kaj esplorojn. Iun tagon, Ĝaŭ Puju venis al la hejmo de Vang Jakin. Ŝia patro Vang Juhaj rakontis al li pri sia pasinteco. Vang Juhaj estis maljuna karboministo. Antaŭ pli ol 30 jaroj li estis trompe venigita de Ŝandong-provinco al karbominejo de Liaŭjuan kaj laboregis por japanaj agresantoj. Li ĝibiĝis pro penlaborado kaj vundiĝis je la piedoj kaj preskaŭ mortis pro turmentado. Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio liberigis lin el la surtera infero kaj li ekhavis feliĉan vivon. Li edziĝis en la aĝo de pli ol 40 jaroj kaj naskiĝis al li nur la sola filino Vang Jakin. Sed en la aĝo de 3 jaroj ŝi grave malsaniĝis kaj fariĝis surdmutulo. Akompanate de sia patro ŝi vizitis multajn hospitalojn, sed ne ricevis kuracon.

Ĝaŭ Puju vizitis la familiojn de surdmutuloj unun post alia kaj konkludis, ke la surdmutuloj ne ricevis atentan kuracon. Li iris al proksima hospitalo kaj tie trovis neniun kazon de kuracado al surdmutulo. Li pensis, ke oni faris nek atentan



Fonetika ekzerco

diagnozon, nek kuracon, sed kial ili faris konkludon, ke la malsano estas nekuracebla? En ligo kun la materialo akirita per enketado, li kaj la kamaradoj de la taĉmento atente studis instruojn de Prezidanto Maŭ en *Pri Praktiko*: “Se vi volas akiri scion, vi devas partopreni la praktikon ŝanĝi la realon. Se vi volas scii la guston de piro, vi devas ŝanĝi la piron—proprabuŝe manĝi ĝin.” Dank’ al la lerno ili firmigis al si la memfidon pri sukceso.

Por ne fari eĉ unu eraran pikon al pacientoj, ili unue faris provon ĉe la stimulaj punktoj sur sia propra korpo montritaj de akupunkturaj libroj por akiri sperton.

Ĝaŭ Puju faris centojn da pikoj sur sia korpo, akiris iom da sperto kaj komencis kuraci surdmutulojn.

Iun tagon, Ĝaŭ Puju faris pikojn al Vang Jakin kaj poste manklakis post ŝia dorso. Ŝi tuj returnis la kapon, ridetante pinĉis la orelojn kaj balancis la kapon, por sciigi al Ĝaŭ, ke ŝi aŭdis. Ĝaŭ Puju retroiris kelkajn paŝojn kaj trifoje manklakis. Vang Jakin etendis tri fingrojn montrante,

ke ankaŭ tion ŝi aŭdis. Diligenta praktiko donis la unuajn fruktojn, kio tre ĝojigis Ĝaŭ Puju kaj la aliajn kamaradojn. Poste, per tiu metodo la kuraca taĉmento baldaŭ rehavigis aŭdkapablon al plejparto de la surdmutaj lernantoj.

La surdmutaj geknaboj unuafoje aŭdis la mirindajn sonojn de la mondo, sed ili ne povis paroli, tial ili tre ĉagreniĝis. Iun matenon, Ĝaŭ Puju vidis ke Vang Jakin larmas sola post pordo. Ŝi ploris pro tio, ke ŝi aŭdis la kanton *Ruĝas la Oriento* kantita de la ĈPLA-anoj, sed ŝi mem ne povis kanti. Ĝaŭ Puju pensis, kial la pikado efikis en kuraco al surdeco, sed ne al muteco? Li rememoris la staton de la antaŭa kuracado kaj rimarkis, ke oni profunde enpikis ĉe la oreloj, sed malprofunde ĉe la punkto *Jamen*. Li konjektis, ke ĝi eble estas la ŝlosila punkto por kuraco de muteco. Tiam venis al li la ideo profunde piki ĉe tiu punkto.

Por trovi bazon por sia konjekto, Ĝaŭ Puju legis akupunkturajn librojn. Tiuj libroj klare skribis, ke ĉe la punkto *Jamen* oni povas piki nur

je profundeco de 3-5 fen-oj (1 fen-o= \hat{c} .1/3cm.) kaj nepre ne pli profunden. Iuj diris, ke la punkto *Jamen* estas danĝera loko por la homa vivo. Se oni pikos al sanulo je 10 fen-oj, li fariĝos mutulo, kaj piko de 15 fen-oj alportos al li mortodanĝeron. Pri tiuj diroj Ĝaŭ Puju multe pensis: Ĉu iri senŝanĝe laŭ la spuroj de la antaŭuloj aŭ daŭre klopodi sur la bazo de praktika sperto de la antaŭuloj por ilin superi kaj eltrovi novon? En kunveno de la kuraca taĉmento Ĝaŭ Puju faris jenan parolon: "Mi legis en akupunkturaj libroj, ke la limigita profundeco de pikado estas 3-5 fen-oj. Tio montras al ni, ke en praktiko iuj antaŭuloj iam superis tiun limon, sed renkontis danĝeron. Kaj limigite de la tiama scienca nivelo, ili ne povis ĝuste resumi la sperton, trovi la kialon de malsukceso kaj daŭre praktiki, sed haltis ĉe la limo de 3-5 fen-oj. Nun laŭ anatomio ni konis, ke piko je tia profundeco ĉe *Jamen* povas doni nenian efikon. Ni devas transpasi tiun limon por daŭre antaŭenmarŝi!" En tiu kunveno Ĝaŭ Puju proponis, ke oni faru provon de profunda piko sur lia korpo ĉe *Jamen*. La estro de taĉmento opiniis lian analizon prava, tamen, li, veterana kuracisto, klare scias, ke la punkto *Jamen* situas sur tre grava loko sur la homa korpo kaj li, kiel respondeculo de la kuraca taĉmento, devas konsideri pli bone. Unuflanke li donis subtenon al la propono de Ĝaŭ Puju kaj aliflanke ordonis ke oni faru plian studon pri konkretaj sekurigaj rimedoj.

La kunveno finiĝis en tre profunda nokto. Ĝaŭ Puju revenis de la Surdmutula Lernejo al la polikliniko de sia trupo kaj ne povis kvietiĝi sidante en fizioterapia ĉambro. Aperis antaŭ liaj okuloj la ĉagrenaj vizaĝoj de la surdmutaj geknaboj kiuj ne povis paroli. Li profunde konsciis ke lia tasko estas grava kaj pli bone komprenis la signifon de profunda piko ĉe *Jamen* por kuraci surdmutecon. Oni ne devis plu

atendi! Ĝaŭ Puju kuraĝe enpikis en *Jamen* sur sia korpo la arĝentan pinglon. Kiam la pinglo enpikiĝis je 5 fen-oj, li sentis tre malfortan stimulon; kiam la pinglo enpikiĝis ĝis 10 fen-oj, li sentis pli fortan stimulon kaj kiam la pinglo atingis la profundecon de 15 fen-oj li sentis fortan stimulon kaj liaj manoj sentis tian elektrofrapon ke ili malfortiĝis. Ĉu ĉesi aŭ daŭre enpiki? Ĝaŭ Puju sciis, ke pli profunda enpiko eble donos pli bonan stimulon, sed tio ankaŭ eble kaŭzos morton. Vivi aŭ morti, jen kia alternativo sin trudis al Ĝaŭ Puju. Li pensis: "Por liberigi la surdmutulojn el la sufero, mi volantas oferi mian vivon. Se mi mortos, miaj kolegoj povos ĉerpi lecionon el mia malsukceso por daŭre antaŭenmarŝi." Li malfermis la taglibron kaj notis la lokon, angulon, profundecon kaj stimulan fortecon de la enpikado.

Tion farinte Ĝaŭ Puju daŭre enpikis en la punkton *Jamen*. Subite li sentis, ke la kolo kva-

Vang Jakin en akupunkturado



zaŭ ŝveliĝis, la gorgo febrigiĝis kaj la membroj paraliziĝis, kvazaŭ kurento trakuris lian korpon. Li akiris kontentigan senton. Li eltiris la pinglon kaj vidis, ke ĝi eniĝis je 25 fen-oj! Li eksaltis deĝojo kaj faris plurajn enpikojn kaj akiris saman senton. En la spirito de sinofero por la popolo, Ĝaŭ Puju kuraĝe provis, rompis la limon de antaŭuloj kaj akiris sperton en profunda enpiko ĉe *Jamen-punkto*. Ankaŭ aliaj kamaradoj de la kuraca taĉmento prove faris profundan enpikon sur sia korpo kaj poste komencis kuraci surdmutajn geknabojn. Ĝaŭ Puju faris enpikojn al Vang Jakin kaj post tri tagoj la 17-jara surdmuta knabino fine reakiris parolkapablon.

Dank' al la kuraco de la taĉmento, inter la 168 geknaboj de la Surdmutula Lernejo de Liaŭjuan, 157 akiris aŭdkapablon kaj 149 jam povis paroli. Ekboldis la surdmuta lernejo, kiun oni antaŭe nomis "senzona mondo". La resanigitaj geknaboj mem verkis kanton:


*Lianoj velkaj de mil jaroj jen burĝonojn donas
Kaj feraj arboj dekmil-jaraj nun mirakle floras;
Dank' al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ,
Hodiaŭ surdmutuloj ni feliĉe ekparolas.*

Post resaniĝo Vang Jakin ankoraŭ pli amas ĈPLA kaj plurfoje petis permeson por aliĝi al ĝi. En septembro de 1971, ricevinte la permeson ŝi glorie aliĝis al ĈPLA kaj estis postenigita kiel sanitaristino en la hospitalo kie laboras Ĝaŭ Puju. Helpate de Ĝaŭ Puju kaj liaj kolegoj ŝi iom post iom ellernis certajn teknikojn kaj komencis kuraci surdmutulojn.

En la amasoj vaste cirkulas rakonto pri Ĝaŭ Puju kaj la kuraca taĉmento, kiuj senrezerve kaj ĝisfunde servas al la popolo. Ilia sukcesa sperto en kuraco de surdmuteco estas iom post iom disvastigita. Pli kaj pli multaj resanigitaj surdmutuloj kantas la elkoran kanton.

Kuracitaj geknaboj kantas kune kun kamarado Ĝaŭ Puju.






Profesoro Ĝu Futang, la aŭtoro de la artikolo

Por la Sano de Infanoj

MI laboris kiel pediatro jam 45 jarojn. Ĉiam kiam mi rememoras la pasintecon, tragikaj scenoj de la malnova Ĉinio aperis antaŭ miaj okuloj. En vintro de 1929, pro katastrofo en norda Ĉinio sennombraj rifuĝintoj torentis al Pekino kaj multaj infanoj sin trovis en malsato kaj malsano. Ekzantema tifo kaj rekuranta febro forrabis la vivon de multaj infanoj. Tiam mi estis juna pediatro laborinta nur du jarojn. Kiel mi esperis, ke nia lando potenciĝos kaj konstruos bonan infanan hospitalon por forigi suferojn de la infanoj. Sed tio estis nerealigebla en la duonfeŭda kaj duonkolonia malnova Ĉinio. En 1942 mi kaj kelkaj kolegoj kune funkciigis infanan hospitalon unikan en Pekino. Estis nur 6 malsanulaj litoj en ĝi kaj poste pliiĝis ĝis 25 post multaj klopodoj. Pro diversaj malfaciloj ni apenaŭ povis teni la hospitalon. Mi estis ofte insultata de reaciaj oficiroj, kun timo kuracis riĉulidojn kaj tute ne povis servi al la vasta laboranta popolo. Tiam nia lando ne povis produkti la okcidentajn medikamentojn kaj la importitaj estis tre multekostaj. Kiel la malriĉuloj kiuj eĉ ne povis sin vivteni, povis aĉeti ilin.

Fine forpasis la malluma malnova Ĉinio. En la 1-a de oktobro de 1949 fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko kaj de tiam stariĝis la ĉina popolo! Kiel reprezentanto de medicinaj laborantoj mi honore partoprenis la solenon en Tian-anmen-placo kaj vidis la grandan gvidanton de nia popolo Prezidanton Maŭ Zedong. Mi tre emociiĝis en tiu tempo.

Kun la rapida disvolviĝo de la socialisma revolucio kaj konstruado de nia lando okazis granda ŝanĝiĝo al nia medicina kaj higiena afero. La Partio kaj registaro tre zorgas pri la sano de la popolo. En la komenca periodo post la liberiĝo de Pekino, la popola registaro tuj mobilizis kaj organizis vastajn amasojn por disvolvi purigan movadon. Ruboj amasigitaj en 400-500 jaroj de Ming- kaj King-dinastioj estis forportitaj kaj kloakoj estis riparitaj kaj ordigitaj. En la komenca periodo post la Liberiĝo troviĝis centmiloj da malsanuloj de kala-azaro postrestintaj de la malnova Ĉinio, inter kiuj la plejparto estis infanoj, kaj 5 procentoj de la malsanuloj mortis. En 1950, la popola registaro organizis multajn medicinajn taĉ-



Maljuna kuracisto de la ĉina medicino ekzamenas malsanan infanon.

mentojn, kiuj iris al la kamparo por fari grandskalan preventadon kaj kuracadon de malsanoj. Post klopodo de kelkaj jaroj fine ekstermiĝis fundamente kala-azaro en la tuta lando. Precipe mi ne atendis, ke nelonge post la fondiĝo de la nova Ĉinio, sub la malfacilaj kondiĉoj de la nacia ekonomio la Partio kaj registaro decidis konstrui modernan kaj relative grandan infanan hospitalon en Pekino kaj komisiis al mi la preparan laboron. Tio multe kuraĝigis min kaj profunde sentigis al mi la zorgon de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ al la infanoj.

En la nove konstruita infana hospitalo troviĝas 600 malsanulaj litoj, kiuj estas 4-oblo de la malsanulaj litoj de infanaj hospitaloj de la tuta lando antaŭ la Liberiĝo. En ĝi establiĝis naŭ medicinaj fakoj de internaj malsanoj, ĥirurgio, infektaj malsanoj, ĉina medicino, akupunkturo, fizioterapio, otorinolaringologio, okuloj, k.a. Krome ĝi havas ankaŭ X-radian fakon, patologian fakon kaj laboratorion, kaj relative kompletajn modernajn kuracaparatojn. La hospitalo servas por pacientoj de ĵusnaskitaj ĝis 14-jaraj infanoj. La malsanulaj ĉambroj estis projektitaj konforme al la bezonoj de infanoj kaj troviĝas inter ili ankaŭ amuza ĉambro.

La kliniko de la hospitalo servas tage kaj nokte. La pago por unuafoja, denova aŭ urĝa kuracado sendiference estas dekono de 1 juano. Por enhospitaliĝo paciento ne bezonas doni mongarantion, kaj la kosto por 1 tago estas nur unu juano. Ankaŭ la kosto por operacio estas relative malmulta. Por operacio de malfermo de brusto nur 30 juanoj estas bezonataj. Dank' al senĉesa disvolviĝo de farmacia industrio de nia lando, sufiĉe da diversaj medikamentoj estas liveritaj kaj iliaj prezoj grandskale reduktiĝis plurfoje en la 22 jaroj post la Liberiĝo. Nun la medikamenta prezo egalas al ĉirkaŭ 20 procentoj de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

Post finkonstruo de la Pekina Infana Hospitalo fondiĝis infanaj hospitaloj ankaŭ en multaj provincoj kaj urboj de la tuta lando. En universalaj hospitaloj de diversaj lokoj establiĝis kaj grandiĝis kliniko kaj malsanulaj ĉambroj de pediatrio. Kiam mi vidis naivajn vizaĝojn de la infanoj dum mia kontrolo al malsanulaj ĉambroj kune kun aliaj kuracistoj kaj flegistinoj, mi ofte ekmemoris la tragikan vivon de infanoj de la ĉinaj laborantaj popolanoj en la malnova Ĉinio. La fakto komprenigis al mi, ke por disvolvi pediatrian aferon de la popolo, persona forto estas nur guto en la

vasta maro; se la ĉina proletaro ne posedus regpotencon, la popola medicina afero ne povus disvolviĝi.

Responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ “**meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon**”, plurfoje ni sendis kuracistojn kaj flegistinojn al la kamparo, fabrikoj kaj loĝkvartaloj por rondira kuracado. Kvankam mi jam maljuniĝis, sed mi plurfoje petis permeson iri al kamparo kaj antaŭ kelkaj jaroj fine mi ricevis permeson iri al la Ĝanghiĝuang-a Popola Komunumo en antaŭurbo de Pekino kaj tie vivis kelkajn monatojn. La diligenta kaj modesta laborstilo kaj senegoisma kvalito de la komunumanoj donis al mi grandan edukon. Mi kuracis ilin sur ilia terlito, kulturis kamparanajn kuracistojn neapartigatajn de produktado kaj kune kun ili propagandis preventadon de malsanoj. La komunumanoj tre bonvenigis kaj fidis nin. La kelkmonata vivo en la kamparo donis al mi bonan impreson neforgeseblan.

La proletara revolucia higiena linio ĉiam pledas por preni preventadon de malsanoj kiel la ĉefan laboron en du flankoj de kuracado kaj preventado. La socialisma medicino servas por teni la sanon de la popolo, sed ne por gajni monon. En la Pekina Infana Hospitalo instaligis speciala sanprotekta fako, kiu respondecas pri propagando de higiena scio al loĝantaro, lernejoj, infanvartejoj kaj infanĝardenoj kaj direktado de amasa higiena movado. Nia hospitalo en difinitaj tempoj inokulas senpage al pli ol 16,000 infanoj diversajn vakcinojn, inkluzive tiun de poliomjelito. En la komenca periodo post la fondiĝo de la nova Ĉinio jam eliminiĝis variolo kaj ĥolero. En la lastaj dek jaroj, dank’ al vasta apliko de vakcinoj de morbilo kaj poliomjelito, tiuj du infektaj malsanoj funda-

mente neniigis en la loĝkvartalo respondecata de nia hospitalo.

En disvolvo de la ĉina pediatrio ni firme iras la vojon de kombino de la ĉina medicino kun la okcidenta kaj per modernaj sciencoj kaj teknikoj serioze resumas riĉajn spertojn de la ĉinaj medicino kaj farmacio. En la scienca esploro ni prenas la ordinarajn kaj ripetemajn malsanojn de infanoj kiel nian ĉefan objekton.

Antaŭ la Liberiĝo B-tipa encefalito longtempe kaj vaste minacis la vivon de niaj infanoj. En la lastaj 12 jaroj, ni kuracas ĝin per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino kaj akiris rimarkindan sukceson. Meznombro 90% de la kuracitaj kazoj sukcesis kaj nur al 1.4% de ili okazis postsekvaĵo.

Toksa disenterio estas infana malsano ĉirkulanta en iuj lokoj de Azio. Ĝi okazas tre rapide, furioze kaj ŝanĝeme kaj ĝiaj suferantoj mortas en 1-2 tagoj. Antaŭ la Liberiĝo pli ol 30% de pacientoj de tiu malsano mortis. Nun 99% el la pacientoj akceptitaj de nia hospitalo estas resanigitaj.

Prezidanto Maŭ Zedong instruas al ni, ke ni lernu Doktoron Norman Bethune, membron de la Komunista Partio de Kanado, lernu de li la spiriton de internaciismo kaj komunismo kaj la spiriton de senrezerva sindonemo por la bono de aliaj tute sen konsidero pri si mem. Prenante N. Bethune kiel sian ekzemplon miloj kaj dekmiloj da ĉinaj medicinaj laborantoj diligente servas al la popolo. Mi tre ĝojas, ke mi vivas en la socialisma nova Ĉinio kaj daŭre kontribuas por la popolo en la restaj jaroj de mia vivo. Nun mi ĉefe okupiĝas pri resumado de la pasintaj spertoj kaj verkado pri pediatrio kune kun kelkaj kolegoj sub la gvido de la Partio. Mi dediĉos mian tutan energion al la pediatria afero de nia lando.



En ludejo de la Pekina Infana Hospitalo

Rememoro

pri D-ro Norman

Bethune

EN la jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito de nia lando, mi havis la ŝancon lerni kaj labori ĉe Norman Bethune, granda komunisma batalanto, mondfama ĥirurgo. Mi propraokule vidis lian noblan kvaliton, rigoran spiriton de senĉesa strebado al pli alta nivelo de kuracarto. Mi ricevis senlaca edukon de Doktoro Bethune, kio estas por mi senkompara honoro kaj liaj instruoj teniĝos por ĉiam en mia koro.

En printempo de 1939, post vojaĝo trans sen-nombraj montoj kaj riveroj, kamarado Bethune venis, kun sia kuraca taĉmento al la Milita Regiono de Meza Hebej-provinco. Tiam mi estis tre juna sanitaristo.

Iun posttagmezon, la Departemento de Publika Sano de la milita regiono sciigis al mi, ke Doktoro Bethune skribis de la fronto, ke li urĝe bezonas medikamentojn kaj higienajn materialojn. La supera instanco ordonis min kaj du aliajn kamaradojn tuj sendi la postulatajn objektojn. Kiam ni venis al Doktoro Bethune, jam estis profunda nokto. Li estis ankoraŭ skribanta lernolibron sub olea lampo. Kiam li eksciis ke ni alportis medikamentojn, li tuj saltis de sur la terlito pro ĝojo. Legante la inventaron, li parolis en la

ĉina lingvo: “Bonege, bonege!” Li tuj venigis interpretiston kaj kuraciston por ke ili helpu lin kontroli la alportitajn kuracilojn. Ĉar estis jam tre malfrue, la interpretisto konsilis ke li ripozu kaj tion faru en la sekvanta tago. Ankaŭ ni estis tre lacaj pro la longa kaj hasta irado, tial ni aprobis la konsilon. Sed kamarado Bethune ekridetis kaj diris al ni: “Ni ne devas prokrasti la hodiaŭan aferon ĝis morgaŭ, ĉar morgaŭ estos aliaj aferoj farendaj, precipe kiam ni laboras sur fronto. Kion fari, se ĉi nokte estos urĝa tasko? Ni devas anticipi ĉion eblan, kaj nur tiam ni povos endormiĝi.”

Lia serioza kaj sincera parolo tuj forpelis nian laciĝon. Ni tuj komencis ordigi kun li la medikamentojn kaj kuracajn instrumentojn. Tio estis por mi la unua fojo de renkontiĝo kun la granda internaciisma batalanto kamarado Bethune kaj donis al mi profundan impreson.

Ĝuste kiel li antaŭvidis, en la sekvanta frumatenokuriero sendis al ni ordonon de la stabo, ke ni tuj ekiru pro urĝa tasko. Ni eĉ ne havis tempon por matenmanĝi kaj ekiris kune kun Doktoro Bethune. De tiam mi pasigis neforgeseblajn tagojn kaj noktojn en kiuj mi laboris sub la zorgo de kamarado Bethune.

I

En printempo de 1939, japanaj agresantoj faris kruelegan "balaadon" kontraŭ la gubernioj Anping, Hegian, Jenkiu k.a. de la Milita Regiono de Meza Hebej.

Ĉirkaŭ aprilo la Okavoja Armeo faris kvar relative grandajn batalojn kontraŭ japanaj agresantoj sur la ebenejo de meza Hebej. En la tre malfacilaj tagoj de batalado Doktoro Bethune kaj lia kuraca taĉmento tage kaj nokte servis sur frontaj pozicioj.

En la fino de marto, nombro da malamikoj en la gubernia urbo de Anping komencis manovradon. La malamikaj trupoj kun mekanikaj ekipaĵoj arogante intencis ataki lokojn interne de nia milita regiono. Utiligante Hutuo-riveron kiel naturan ŝirmejon, niaj trupoj embuskis malamikojn ĉe Hanliu-vilaĝo. La batalo iris tre intense. Amasoj portis per brankardoj vunditojn en la lernejon je la orienta fino de la vilaĝo. Doktoro Bethune ordonis flegistojn porti grave vunditajn soldatojn en la operaciejon. Ne tre grave vunditaj soldatoj restis en aliaj ĉambroj por bandaĝi. Ne malproksime krakado de pafiloj kaj eksplodoj de bomboj tremigis la fenestropaperojn. Doktoro Bethune kliniĝis super vundito kaj absorbite faris operacion en la lumo de surkapa lampo. Antaŭ la fino de ĉiu operacio Doktoro Bethune ĉiam atentigis, ke oni pretu enporti alian vunditon en la operaciejon. Kamaradoj admonis lin iom ripozi en la tempo de en-kaj el-porto de vunditoj, sed li ĉiam diris: "Zorgu ne pri mi, sed pri vunditoj. Faru rapide por ŝpari tempon kaj savi pli multajn vunditojn. Ni devas ne ripozi sed batali kiel soldatoj sur la fronto malgraŭ morta danĝero."

Post du horoj de intensa laboro ĉiuj alportitaj vunditoj jam ricevis necesan traktadon. En tiu



Kamarado Norman Bethune

tempo kuriero sendis al ni ordonon de la stabo, ke ni tuj translokiĝu, ĉar niaj trupoj jam plenumis la taskon de embusko. Kiam nia kuraca taĉmento venis al la orienta fino de la vilaĝo, nin postkuris du kamparanoj portantaj alian kamparanon, kies piedo estis grave vundita de obuso. Ili petis helpon de Doktoro Bethune. Tamen la tempo ne permesis nin halti, ĉar niaj trupoj jam forlasis la pozicion kaj la malamikoj komencis ĉirkaŭi nin de ambaŭflanke. Gardistoj urĝigis nin tuj foriri, sed, vidante ke la vundo de la kamparano estas tre grava kaj senĉese sangadas, Doktoro Bethune firme decidis, ke li kaj iu kuracisto restu por savi la vunditon, kaj la ceteraj homoj kaj la ĉevalo portantanta objektojn foriru. Ni diris al li, ke la stato estas tre danĝera, li devas tuj foriri aŭ ni foriros

Doktoro Bethune faras operacion en provizora operaciejo.



kunportante la vunditon. Sed li diris, ke la stato de la vundito estas pli danĝera kaj kuracisto ne devas apudstari senfare. Li grandpaŝe iris en domon kune kun la blankardo. Tiam ni nur povis lasi malmultajn homojn foriri la unuaj kun la ĉevalo kaj la ceteraj restis kune kun Doktoro Bethune por kuraci la vunditan kampanon.

Doktoro Bethune malfermis la bandaĝon kaj rimarkis ke pieda angio estis rompita. Li rapide elprenis angiopinĉilon, pinĉpremis la sangantan lokon kaj bandaĝis la vundon. Vidante ke Dok-

toro Bethune savis la vunditon malgraŭ morta danĝero, la kampanoj estis kortuŝitaj ĝis larmoj. Kiam gardisto venis de la okcidenta fino de la vilaĝo por sciigi al ni, ke malamikoj jam atingis la orientan finon de la vilaĝo, Doktoro Bethune jam sekure forlasis la vilaĝon sub eskorto de la kampanoj. Kiam ni diris al li poste, ke estroj de la trupo tre maltrankviliĝis pro li, li diris: "Kuraca taĉmento devas esti sagaca kaj kuraĝa kiel komandanto de trupo, devas kapti ĉiun sekundon por savi vunditojn." Li emfazis: "Vun-

ditoj estas viaj kamaradoj. En ĉia cirkonstanco kaj en ĉiu afero vi devas konsideri unue pri ili kaj rigardi ilin pli gravaj ol vi. Alie vi ne kvalifikiĝas kiel higiena laboranto. Verdire, vi ne meritigas la nomon de soldato de la Okavoja Armeo.” Kun tia profunda klasa amo kamarado Bethune kuracis vunditojn kaj malsanulojn per ĉiu rimedo.

La kuraca taĉmento transiris al la gubernio Hegian. Nelonge post tio japanaj agresantoj kolektis pli ol 2,000 homojn por surprizi la sidejon de gvida organo de niaj trupoj. Niaj trupoj embuskis ĉirkaŭ Kihuj kaj Daguanting por atendi ŝancon. Kiam la malamikoj iris en la pozicion de nia 120-a divizio, eksplodis la batalo. Doktoro Bethune kaj la kuraca taĉmento rapide venis al iu malgranda vilaĝo, kiu situis 3-4 kilometrojn fore de la batalejo. En iu templo ni starigis operaciejon. En la profunda nokto la batalo iris tre arde kaj la bruo de densaj pafadoj fariĝis pli kaj pli proksima al ni. Ni rigardis eksteren kaj vidis, ke la ĉielo estas reflekte ruĝigita. Venis pli kaj pli multaj vunditoj. Kiel kutime, Doktoro Bethune koncentris sian tutan atenton por fari operacion. Subite granda obuso falis apud iun dikkan arbon malantaŭ la templo kaj forigis duonon de la arbokrono. Doktoro Bethune neniam atentis pri tio sed streĉe operaciis.


La estro de la milita regiono informiĝis ke lia operaciejo estis tre proksima al la batalejo kaj maltrankviliĝis pro lia sekureco. Li sendis estron de la Departemento de Publika Sano por admoni lin iom malproksimigi la operaciejon. Sed Doktoro Bethune skuis la kapon kun rideto: “Ne zorgu pri mia sekureco. Unue oni devas konsideri la vunditojn. En milito oni devas tiel agi. Armea kuracisto devas resti kune kun la batalantoj. Ju pli proksime de tranĉeo, des pli efike oni povas savi vunditojn.” En batalo de tri sinsekvaj tagnoktoj, Doktoro Bethune neniam forlasis la operaciejon. Nur kiam oni en- kaj el-portis vunditojn, li kaptis la tempon por ripozi sidante sur tabureto. Servosoldato Malgranda He portis plurfoje al li manĝaĵojn, sed li ne havis tempon por manĝo. La servosoldato eĉ larmis pro li.

Vidante ke Doktoro Bethune malgrasiĝis tagon post tago kaj lia

dorso iom post iom kurbiĝis, ĉiuj maltrankviliĝis pro lia sano. Sed Doktoro Bethune ofte diris: “Ne rigardu min kiel antikvaĵon, sed kiel trafan mitralon. Kiam armea kuracisto pli multe laboras por vunditoj, lia vivo estas pli signifata.” Por savi vunditojn, kamarado Bethune forgesis manĝon kaj dormon. Tiel en nokto kiel en tago li laboris sen timo al malfaciloj kaj danĝeroj. En tiu 69-hora senriposa laboro, li sukcese faris operaciojn al 115 vunditoj.

Dum batalo, Doktoro Bethune savis vunditojn sen konsidero pri sia sekureco; en ordinaraj tagoj li tre zorgis pri malsanuloj el la amasoj. Iun tagon, ni venis al vilaĝeto. Pro kontinua pluvado de kelkaj tagoj, iu avino laksis. Vidinte krucon sur la sakoj de la kuraca taĉmento, kamparanoj sciis, ke ni estas kuracistoj, kaj petis ke ni kuracu ŝin. Doktoro Bethune enpaŝis la domon kaj vidis, ke la avino estas terure pala pro longa laksado kaj eĉ ne havis la forton por paroli. Tio estas serioza kolapso. Li tuj ordonis transfuzi salan akvon al la malsanulino. Sed la kamparanoj diris: “Ni jam longe ne manĝis salon pro blokado de la ja-

Doktoro Bethune verkas lernolibron por kursanoj.





Doktoro Bethune ekzamenas vunditojn de la Okavoja Armeo.

panaj agresantoj. Kion fari?" Doktoro Bethune konsolis la kamparanojn: "Rimedon ni havas." Li preparis salan akvon per rafinita salo uzata de la kuraca taĉmento en steriligado. Post kelkaj horoj la malsanulino estis savita. Por danki Doktoron Bethune, kamparanoj kaptis grandan fiŝon kaj preparis el ĝi supon. Sed la supo sen salo malbone odoris kaj oni ne povis manĝi. Servosoldato Malgranda He prezentis al Doktoro Bethune bovlon da supo kaj intencis aldoni iom da rafinita salo de la kuraca taĉmento. Rimarkinte tion Doktoro Bethune rigore kritikis lin: "Mi devas vivi same kiel la aliaj kaj ne ĝui apartan favoron. La salo devas esti uzata en steriligado. Kamparanoj ne manĝis salon dum pluraj jaroj, ĉu estas grave, ke ni kelkajn tagojn ne manĝas salon?" Tion dirante li prenis la supon kaj ekmanĝis.

Kamarado Bethune estis ekstreme respondecema al la revolucia afero kaj ekstreme varmkora al la popolo. En la batala vivo de efektivigado de sia granda idealo, li montris rigoran sciencan laborstilon. Li neniam timis malfacilojn kaj kuraĝis krei novon. En la malfacilaj militaj jaroj, estis tre malfacile por la kuraca taĉmento akiri medikamentojn. Doktoro Bethune ofte kuraĝigis nin ne timi malfacilojn, ĉar la homo havas saĝon. Por solvi la problemon de manko de kuracaj instrumentoj, li instigis nin cerbumi por mem fabriki instrumentojn. En iu batalo, oni alportis multajn vunditojn kaj latoj por fiksado de rompitaĵoj estis elĉerpitaĵoj. En transportado, iu vundito, kies kruro rompiĝis kaj ne estis fiksita per latoj, apenaŭ povis elteni la doloron. Tion vidinte Doktoro Bethune kritikis nin, ke ni ne serĉis surogatojn por fiksi la vunditan kruron. Neniu el ni havis bonan ideon. Sed li trovis paron da militpreditaj botoj. Li tondis la frontan parton, enigis la kruron en la boton por ke la malantaŭa parto de la boto povu fiksi la rompitan oston. Tiamaniere la kruro fiksiĝis kaj sentis varmon.

Doktoro Bethune ofte diris al ni: "Nur atentema kaj varmkora kuracisto povas elpensi rimedojn por kontentigi la bezonojn de paciento."

Iun fojon ni trovis inter militpredoj du paroĵojn da kaŭĉukaj operaciaj gantoj. Doktoro Bethune ĝoje diris al mi: "Bone konservu ilin, ke ni povu uzi ilin en operacioj de torako kaj abdomena kavo." Iufoje, post operacio mi lavis la gantojn kaj ilin sunumis. Ĉar estis tre varme, la gantoj kungluiĝis. Mi volis disigi ilin, sed pro malatento mi truigis unu ganton. Tio tre ĉagrenis Doktoron Bethune. Li diris: "Tio estas mia kulpo, ĉar mi ne bone klarigis al vi kiel sekigi tiajn gantojn. Tamen, vi devas demandi kion vi ne scias, sed ne devas agi tiel malatente." Mi tre ĉagreniĝis. Li konsolis min: "Vi estas juna kaj sensperta. Lerne pli multe en la estonto."

Alian nokton, Doktoro Bethune demandis min, kial mi ankoraŭ ne enlitiĝis. Mi respondis,

ke mi iros por kontroli, ĉu difektiĝis la medikamentaj kestoj. Li tuj laŭdis min. Sed kiam li vidis ke inter la medikamentajn botelojn mi ŝtopis multe da steriligita kotono, li tuj rigore kritikis min: “Vi estas tenanto de medikamentoj kaj bone scias, ke likvaj medikamentoj korodos kotonon, se ili verŝiĝos el la boteloj; kaj krome vi bone scias ankaŭ tion, ke la kotono estis akirita kontraŭ granda peno. Kial vi ne ŝtopis la interspacojn per pajlo aŭ similaj?” Mi klarigis, ke mi volas akiri du leporojn per unu ŝtono. Ĉar la kotono okupis la vakantajn lokojn en la kestoj kaj tio ŝparis al mi refojan pakadon. Tiam la mieno de D-ro Bethune serioziĝis kaj li kolere diris al mi: “Maldiligenteco kondukis vin al malrespondeco. Mi anstataŭigos la ĵusan laŭdon per rigora kritiko.” Tion dirante li portis de la korto garbon da mola pajlo kaj helpis min elpreni la kotonon kaj poste plenigis la vakantajn lokojn per la pajlo. Li diris al mi ke mi kontrolu, ĉu ĉio estas en ordo. Li demandis min: “Ĉu vi kontentiĝis pri tio?” Mi respondis: “Mi kontentas ne nur pri la bona pakado, sed ankaŭ multe pli pri via profunda eduko al mi.” Mi tuj ŝtopis interspacojn de boteloj en ĉiuj aliaj kestoj. Doktoro Bethune humure diris al mi: “Via teniĝo verŝajne estas bona. La ĵusa laŭdo estas valida. Tamen vi devas kompreni, kio estas la celo de laŭdo kaj kio estas la signifo de kritiko.” Por ĉiam teniĝos en mia koro la rigora stilo de ekstrema respondeco kaj la nobla spirito de kamarado Bethune en senlaca instruado al aliaj.

III

Kamarado Bethune havis noblan komunisman spiriton kaj grandan idealon pri la revolucia afero. Li diris: “Sciu, ke granda afero konsistas el konkretaj bagateloj.” En la inaŭgura kunveno de la Modela Hospitalo li montris: “Oni devas starigi spiriton, nome oni devas havi ne nur noblan penson, sed ankaŭ plenan energion, sinoferemon kaj zorgemon al aliaj.”

Doktoro Bethune ofte postulis nin mastri kaj uzi kuracarton por servi al malsanuloj. Li iam diris: “Por kuracisto, en la unua tago de lernado de medicino, li devas decidi oferi sian tutan energion kaj saĝon al malsanuloj. Ni devas ĉiam pensi kiel eble plej efike kvietigi al malsanuloj la doloron. Resanigi unu plian malsanulon egalas al ekstermo de plia deko da malamikoj.” Li ofte edukis la laborantojn de operaciejo: “Ĉar la homaro kreis lingvon por priskribi agon, tial oni

devas konformigi siajn vortojn al la ago. La operaciejo estas nia pozicio kaj ni devas fari laborojn, iniciateme, diligente kaj rapide, malmulte paroli sed multe labori.”

Ĉiufoje post la fino de operacio, kiam la operaciito estis forportata el la operaciejo, Doktoro Bethune senescepte atentigis: “Levu la vunditajn partojn kaj tenu varmon.” Ĝis nun mi ankoraŭ memoras tiun ĉi vorton.

Iufoje, oni sendis pacienton kun grava vundo je la kapo. Li sentis kapdoloron, kapturiniĝon kaj soifon. Mi helpis lin duone sidiĝi en lito, levis lian kapon kaj volvis lin per litkovrilo. Sed kiam mi trinkigis al li du plenbuŝojn da akvo, li sentis nigriĝon antaŭ la okuloj, poste li naŭzis kaj vomis kaj la okuloj rigidiĝis. Mi tuj venigis Doktoron Bethune. Vidinte ke paliĝis la vizaĝo de la paciento kaj lia pulso estis malforta, li tuj kuŝigis lin, ordonis min levi liajn malsuprajn membrojn kaj mallevi lian kapon, dank’ al tiu aranĝo rapide kvietigis la pacienton. Doktoro Bethune rimarkis, ke mi erare traktis la pacienton, kaj pacience diris al mi: “Altigi vunditajn membrojn kaj konservi varmon, tio estas ĝenerala principo. Tamen, se malalta estas la sangpremo de paciento, do, malgraŭ ke vundo estas sur la kapo, oni ne devas levi la kapon. Por kuracisto, li devas scii ne nur kiel fari, sed ankaŭ kial tiel fari.”

Min tre instigis la spirito de kamarado Bethune en strebado al ĉiam pli alta nivelo de tekniko. Mi konis, ke oni povas pli bone servi al la popolo, nur se li estas ekstreme respondeca pri la laboro, ekstreme varmkora al la kamaradoj kaj strebadas ĉiam al pli alta teknika nivelo.

IV

En 1942, la supera instanco sendis min al Jan-an. En la granda stilĝustiga kampanjo gvidata de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, mi ricevis edukon pri linia batalo. Precipe post aŭskulto de la parolado de Prezidanto Maŭ en la Ĉina Medicina Instituto en Jan-an, mi ekhavis plian konon pri servo al la popolo. Mi decidis mastri medicinan teknikon, daŭre servi sur la fronto prenante la grandan internaciisman batalanton Bethune kiel ekzemplon.

En la periodo de la Liberiga Milito, mi laboris en la armea kuraca taĉmento. Ĉiufoje, kiam mi renkontis malfacilojn en laboro, mi tuj memoris

la obstinan volon de kamarado Bethune kiu ne timis malfacilojn kaj kuraĝis venki ilin. Mi instigis min per lia nobla kvalito de ekstrema respondeco al laboro kaj ekstrema varmkoreco al la popolo.

En iu periodo mankis al ni anesteza drogo kio malhelpis nin en operacio de vunditoj. Mi memoris la vorton de kamarado Bethune: "Uzi anestezan drogon dece, mastri operacian teknikon lerte." Laŭ stato de vunditoj kaj apartaj karakterizaĵoj, ni elpensis rapidan anestezaĵon kaj rapidan operacion, kiuj multe rapidigis operaciojn kaj ŝparigis al ni anestezan drogon.


En operacio oni devas uzi anestezan drogon, kio jam fariĝis tradicia koncepto. Tamen mi propraokule vidis, ke misuzo de anesteza drogo alportis minacon al la vivo de operaciato. Mi memoras, ke kamarado Bethune rigardis vunditojn pli gravaj ol si mem, kaj longtempe esploris kiel solvi la problemon, ke anesteza drogo alpor-

tas al operaciato malfeliĉon. La granda principo de Prezidanto Maŭ pri kombino de la ĉina medicino kun la okcidenta montris la ĝustan direkton al mia esplorado. Ekde 1958, mi kaj miaj kolegoj havis la intencon apliki la antikvan akupunkturaron de nia lando en ĥirurgiaj operacioj laŭ la modernaj sciencaj scioj kaj metodoj. Dank' al ripetada praktikado kaj sperto de aliaj unuoj, ni sukcesis en akupunktura anestezaĵo kaj per tiu metodo ni sukcese faris pulmoektomiojn k.s. operaciojn.

Kamarado Bethune iam diris: "Ĥirurgo devas klopodi por ne esti sklavo de anesteza drogo." Hodiaŭ lia revo fine efektiviĝis.

Ni devas ĉiam lerni de kamarado Bethune la internaciisman kaj komunisman spiriton kaj pene batali por la revolucia afero de la popolo.

**La aŭtoro estas estro de la toraka ĥirurgia fakto de la Pekina Tuberkuloza Instituto.*



La aŭtoro de la artikolo (la meza) faras pulmoektomion al paciento akupunktore anesteza.

En la Hejmloko de Norman Bethune

LA vasta ondeganta Pacifiko apartigas Ĉinion kaj Kanadon, sed amikeco interligas la popolojn de ambaŭ landoj. La amikeca semo, semita de D-ro Norman Bethune, granda batalanto de internaciismo, en la malfacilaj jaroj de la ĉina revolucio antaŭ tridek jaroj, jam burĝonas kaj kreskas nun en la koro de la vastaj popolamasoj de Ĉinio kaj Kanado. En novembro de la pasinta jaro, kiam ĉinaj doktoroj Ĉen Vengie kaj Ha Hianven laŭ invito faris viziton al Kanado, ili ĉie ricevis varman bonvenigon kaj amikan akcepton.

AMIKECA LIGILO INTER LA POPOLOJ DE ĈINIO KAJ KANADO

D-ro Norman Bethune iam laboris en McGill-universitato kaj ĝia dependa reĝa Victoria-hospitalo. En la pasinta jaro, en celebrado de la 150-a datreveno de la fondiĝo de la universitato, por esprimi estimon kaj karmemoron de la kanada popolo al D-ro N. Bethune aparte okazis raporta kunveno pri li kiel parto de la celebra aktivado, kiun laŭ speciala invito partoprenis reprezentantoj de la ĉinaj kuracaj laborantoj. La 25-an de novembro, kiam la raporta kunveno okazis en la halo de McGill-universitato, solene pendis, en la kunvenejo, la naciaj flagoj de Ĉinio kaj Kanado. Kiam la ĉinaj doktoroj Ĉen Vengie kaj Ha Hianven alvenintaj trans miloj da mejloj ascendis sur la podion de prezidantaro, ili tuj ricevis varman bonvenigon de la tuta ĉeestantaro. En la kunveno iu amiko

de N. Bethune prezentis la brilan vivon de N. Bethune kiu persisteme batalis en la hispana kontraŭfaŝisma milito kaj la ĉina Kontraŭjapana Rezistmilito por justa afero de la homaro. Laŭ invito ankaŭ la ĉinaj doktoroj faris raporton pri la medicina kaj higiena laboro de la nova Ĉinio. Kelkaj kanadaj amikoj vizitintaj Ĉinion ankoraŭ prezentis atingojn de la nova Ĉinio. En festeno de la samtaga vespero D-ro R. E. Bell, direktoro de McGill-universitato, speciale donacis al la ĉinaj gastoj memportreton de N. Bethune bone konservitan de amiko de N. Bethune dum dekoj da jaroj.

En tiuj kunvenoj plenaj de profunda amikeco, la ĉinaj doktoroj dankis al la kanada popolo pro ĝia prizorgo kaj subteno al la ĉina revolucia batalo. Doktoro Ĉen Vengie diris: “En la malfacilaj tagoj de la ĉina revolucio, D-ro N. Bethune oferis sian karan vivon al la ĉina Kontraŭjapana Rezistmilito. Nia gvidanto Prezidanto Maŭ donis altan takson al la internaciisma spirito de D-ro N. Bethune kaj alvokis nin lerni de li. La ĉinaj kuracaj laborantoj kaj ĉina popolo ĉiam prenas D-ron N. Bethune kiel sian ekzemplon. Hodiaŭ ni venis al la hejmloko de N. Bethune kaj lia patrinolernejo. Tio plientuziasmigas nin lerni de D-ro N. Bethune.”

En la tago, kiam la ĉinaj doktoroj vizitis Sacre-Coeur-hospitalon, kie iam laboris D-ro N. Bethune, la estro de la direkta komitato de la hospitalo, hospitalestro kaj la doktoroj en-

tuziasme atendis ĉe la pordo por bonvenigo. Du 60-70-jaraj maljunulinoj, kiuj jam delonge emeritiĝis, speciale venis al la hospitalo kaj akceptis la ĉinajn gastojn en malsanulaj ĉambroj surmetinte la flegistinan kostumon siatempe uzatan. Ili sentas sin fieraj pro tio, ke ili laboris kune kun D-ro N. Bethune. Kiam la ĉinaj doktoroj vizitis la Universitaton de Toronto, kie studis N. Bethune, la instanco de la universitato donacis kiel memoraĵon al la ĉinaj gastoj kvar speciale kopiitajn ekzemplerojn de la raporto de progreso pri N. Bethune dum studado. La urbestro de Gravenhurst, la naskiĝurbo de N. Bethune, persone akompanis la ĉinajn gastojn viziti la straton nomatan "Bethune" kaj la domon, kie Bethune iam loĝis. La nuna mastro de la domo eliris kaj varme akceptis la nekonatajn ĉinajn gastojn kaj donacis al ili persone subskribitan foton de la domo.

KIEL MALNOVAJ AMIKOJ LONGE NEVIDITAJ

Kiam la aeroplano surteriĝis ĉe Regina, la ĉefurbo de Saskatchewan-provinco, kiun la ĉinaj doktoroj vizitis, estis jam la 22-a horo en nokto. En la frosta nokto blovis vento kaj flirtis neĝflokaj; la temperaturo jam malaltiĝis ĝis 30° C sub nulo. Multaj kanadaj amikoj varme bonvenigis ilin en la neĝblovo. La amikeca varmo forpelis la malvarmon de la korpo. Kvankam ili ne konis unu alian, tamen kiam ili varme manpremis, ili sentis sin kvazaŭ malnovaj amikoj longe neinterviditaj.

Dum la vizito multaj kanadaj amikoj entuziasme invitis la ĉinajn doktorojn gastigi ĉe ili. Iu profesoro de la politika fakultato de Saskatchewan-universitato serioze foliumis ĉinan gastronomian gvidlibron kune kun sia edzino kaj propramane preparis ĉinajn manĝaĵojn por regali la gastojn venintajn demalproksime. Ilia sincera gastamo profunde kortuŝis la ĉinajn gastojn. Dum multaj hejmaj festenoj, iuj el la mastroj ludis gitaron kaj kantis hejmlokajn popolajn kantojn; aliaj per fortepiano ludis la grandiozan muzikon de *Ruĝas la Oriento*.

En tiuj intimaj renkontiĝoj oni pli bone sentis ke tre kara estas la amikeco inter la ĉina kaj kanada popoloj. La ĉinaj doktoroj ne povas forgesi, ke post scienca raporta kunveno iu kanada knabino donacis al la ĉinaj gastoj longan lanŝalon kiun ŝi trikis por si mem, eĉ sen sciigo de sia nomo. Iu verkisto, kiu skribis biografion de D-ro N. Bethune, entuziasme donacis sian verkon al la ĉinaj gastoj kaj diris, ke li tre ĝojas pro tio, ke li povas persone doni sian verkon al ili.


En la korto de McGill-universitato oni afiŝis anoncon, kiu sciigis, ke vespere en la universitato ĉinaj dokumentaj filmoj kiel *Akupunktura Anestezo* k.a. estos ludataj. Post la publikigo de la novaĵo, je tri horoj antaŭ la ekludo homoj jam alvenis al la halo. La halo tiel pleniĝis je spektantoj, ke oni eĉ ne povis ludi filmon kaj faris decidon ludi du fojojn sinsekve por plenumi la peton de la spektantoj.

La atingoj de la ĉina medicina kaj higiena laboro prezentitaj de la ĉinaj doktoroj vaste interesis diversajn socitavolojn de Kanado. Ĉiufoje kiam la ĉinaj doktoroj finis sian raporton, multaj aŭskultantoj gratule manpremis kun ili, donis al ili donacojn kaj petis ilin subskribi. Ĉiuj interesplene demandis al ili pri la ĉinaj medicino kaj farmacio kaj precipe interesas pri la nova metodo de akupunktura anestezo. Multaj el ili petis de la ĉinaj doktoroj materialon pri tio kaj kunsidis kun ili por diskuti pri klinika sperto de akupunktura anestezo. Dum sia vizito al kvar provincoj de Kanado la ĉinaj doktoroj 16-foje faris raportojn kaj ludis koncernajn lumbildojn kaj filmon, sed tio tute ne povis kontentigi la deziron de la popolanoj. La tieaj televidostacioj petis permeson kopii la dokumentan filmon *Akupunktura Anestezo*. Studentoj de la unua klaso de la Medicina Kolegio de Saskatchewan-provinco speciale invitis la ĉinajn doktorojn fari por ili lecion pri la principo de higiena laboro de la nova Ĉinio.

La amikeca ligilo kunigis la ĉinan kaj kanadan popolojn sur ambaŭ bordoj de la vastega Pacifiko. Nelonge post sia reveno al Pekino, la ĉinaj doktoroj ricevis unu post alia multajn leterojn alsenditajn demalproksime, kiuj preparolas la neforgeblajn renkontiĝojn en Kanado kaj informas al ili, ke eĉ en kafejoj de iuj kanadaj urbetoj oni ankoraŭ interparolas pri la ĉina akupunktura anestezo. Profesoro Phil Gold de la Medicina Fakultato de McGill-universitato alsendis kun sia letero materialon pri sia atingo en esplorado pri kanceroembria antigeno. En la letero li skribis al la ĉinaj amikoj: "Mi kredas, ke la kunsendita materialo helpos vin en via farata esplorado. Se vi bezonas ian ajn materialon, skribu al mi senhezite. Mi tre ĝojas, ke mi havas ŝancon kunlabori kun ĉinaj kolegoj kaj esperas, ke ni atingos utilan rezulton en la estonto."

Sciencisto Hua Luogeng

Hua Luogeng skribas novan verkon.



Sciencisto Hua Luogeng jam havas 62 jarojn. De multaj jaroj, laŭ la vojo de kombino de intelektuloj kun laboristoj kaj kamparanoj, li profundigis en praktikon kaj en amasojn. En Pekino, Ŝanhajo, Kantono k. a. lokoj, kune kun laboristoj kaj kamparanoj, li resumis, levis kaj disvastigis en praktikado optimuman serĉan metodon, kio akcelis la sciencan esploran laboron pli bone servi al la industria kaj agrikultura produkto. Li faris novajn kontribuojn al la socialisma afero de la Patrio kaj estas tre bonvena al la vastaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj.

Hua Luogeng (la dekstra) kaj laboristoj de la Tria Radio-aparata Fabriko de Pekino studas kiel altigi la produktivon per optimuma serĉa metodo.



Hua Luogeng (la dekstra) kaj laboristo de la Elektrotuba Fabriko de Pekino kune studas pri la problemoj kiel servi al industria produkto per matematiko.



Laŭ la invito de laboristoj kaj teknikistoj de malpeza industrio de Tiangin, Hua Luogeng eksplikas al ili pri optimuma serĉa metodo.



Laboristoj de la medikamenta fabriko kaj elektrontuba fabriko de Pekino gastas ĉe Hua Luogeng. Jen ili gaje interparolas.

La familio de Hua Luogeng



Fruktoj de la Ĉina kaj Okcidenta Medicinoj en Kombino

PREZIDANTO Maŭ montris: “La medicino kaj farmacio de Ĉinio estas granda trezorejo. Oni devas klopodi por esplori ilin kaj levi ilin al pli alta nivelo.” Observante ĉi tiun instruon, la vastaj amasoj de medicinaj laborantoj de nia lando kuracas per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino kaj akiris unuajn fruktojn.

1

Kuracistoj de la okcidenta medicino kuracas eksteruteran gravedecon per amputo de ovoidukto kaj elpreno de embrio kaj sanga koagulaĵo. Tia operacio ne nur alportas al paciento doloron kaj malmultigas ŝancojn de gravediĝo pro amputo de ovoidukto, sed ankaŭ ne povas kuraci komplikadojn de eksterutera gravedeco, kiel ekzemple, inflamon de pelva kavoj, intestan adheron k.s.

Kuracistoj de la Unua Dependanta Hospitalo de la Medicina Instituto de Ŝanĥi-provinco modeste konsultis kuracistojn de la Instituto de Ĉina Medicino de Ŝanĥi-provinco por serĉi neoperacian metodon de kuraco de eksterutera gravedeco. De 1958 ĝis nun, per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino ili resanigis per medikamentoj de la ĉina farmacio pacientojn de eksterutera gravedeco de 570 diversaj kazoj kaj akiris rimarkindan sukceson.

En decembro de 1958, juna aktorino estis sendita al la hospitalo pro eksterutera gravedeco. Antaŭ enhospitaliĝo ŝi jam dufoje falis en ŝokon. Post

enhospitaliĝo ŝia malsano troviĝis en stabila stato kaj sango en abdomena kavoj formis koagulaĵon. Ŝi kaj ŝiaj superuloj timis, ke operacio malhelpos ŝian teatran prezentadon kaj petegis kuracistojn ne fari al ŝi operacion, sed ŝin resanigi per medikamentoj. Kuracistoj de la hospitalo faris atentegan observadon kaj sufiĉan preparon por eventuala operacio kaj samtempe kuracis ŝin per medikamentoj. Post unu monato malaperis la koagulaĵo en ŝia abdomeno kaj la menstruo funkciis normale. Ŝi resaniĝis kaj denove partoprenis prezentadon.

Kuraci eksteruteran gravedecon per medikamentoj tre bone efikis al plejparto de pacientoj sed al iuj aliaj ne. Post zorga klinika observado ili rimarkis, ke tiuj malsanuloj suferas ankaŭ de meteorismo kaj stomaka-intesta obstrukco, kiuj okazas pro tio ke interna hemoragio en abdomena kavoj obstrukcas la funkciadon de stomako kaj intestoj kaj malbone influas asimilon de la sango. Sola medikamento ne povas kuraci samtempe la du malsanojn. Post atenta analizo kaj esploro pri la malsanoj, ili akiris sperton en kuracado de iu tipa kazo.

En majo de 1962, iu komunumanino de Juanping-gubernio de Ŝanĥi-provinco suferis de eksterutera gravedeco kaj la malsano estis grava. Ŝi multfoje falis en ŝokon kaj estis sendita al la hospitalo. Tiam la malsanulo 5 tagojn ne fekis nek furzis. La ventro pufiĝis kvazaŭ barelo kaj aŭdiĝis nenia peristalta sono. La metodo de la okcidenta medicino por tion kuraci estas fari operacion, forigi sangon

en abdomeno por malfortigi la stimulon al stomako kaj intestoj. Sed ekzameno montris ke hemoglobino de la paciento estas nur 2.4 gramoj, t.e. malpli ol kvinono de tiu de sana homo. Tio estis granda baro por operacio. Post esploro kuracistoj de la ĉina kaj okcidenta medicinoj decidis liberigi ŝin de stomaka-intesta obstrukco per drasta laksigilo kaj fortigi ŝin per medikamento. Kelkajn horojn post preno de medikamentoj peristaltiĝis ŝiaj stomako kaj intestoj. En la dua tago ŝi ekfurzis kaj multe fekis, evidente malpliigis la pufiĝo kaj doloro de la ventro. Poste ili kuracis ŝian eksteruteran gravedecon. La sango en ventro de la malsanulino estis rapide asimilita. Post 40 tagoj la paciento jam tute resaniĝis.


Iu komunumanino de Kelan-gubernio de Ŝanhi-provinco suferis de eksterutera gravedeco. Krom sangado en abdomeno ŝi sangis ankaŭ dum fekado. Post ekzameno, kuracistoj de la okcidenta medicino trovis, ke interligiĝis la sanga koagulaĵo kun la cekumo, ĉar 7 centimetrojn super la anuso estis fistulo kun diametro de 3 cm., tra kiu la sango fluis en la cekumon kaj poste eksteren. Sen operacio la fistulo ne povas fermiĝi kaj eble okazos infektiĝo, kio gravigos la malsanon. Sed ili trovis ulcerojn sur la ce-

kumo kaj ne estis certaj, ĉu operacio sukcesos fermi la fistulon. Post kuna diagnozo de kuracistoj de la ĉina kaj okcidenta medicinoj, oni decidis aldoni karnokreskigan kaj sangado-ĉesigan medikamentojn en la ĉefan recepton. Post preno de la medikamentoj malaperis la sanga koagulaĵo kaj fermiĝis la fistulo en la cekumo. Dank' al tiu metodo la malsanulo evitis al si operacian doloron kaj rapide resaniĝis kaj revenis al sia laborposteno.

2

Kombinante la ĉinan kaj okcidentan medicinojn, kuracistoj de la hospitalo Guanghua de Ŝanhajo akiris bonan rezulton en ĥirurgia operacio de abdomeno.

Antaŭe, en operacio por amputi stomakon, inteston, galon, lienon k.s. oni devis enigi en pacieron du kanulojn — stomakan kanulon kaj vejnan kanulon kaj post la operacio malsanulo devis fasti. Tio portis al malsanulo grandan doloron. La stomaka kanulo devis trairi naztruon. Kiam ĝi atingis la gorgon, malsanulo naŭzis, vomis kaj ĝia kelktaga restado povis kaŭzi ruĝiĝon kaj ŝveliĝon de la



Per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino la Fugian-provinca Popola Hospitalo savis laboristinon Lin Mejjing, kies korbatado ĉesis 37 minutojn.

Pakistino Liu Mej-ju (la dekstra) de la Ampola Fabriko de Hiamen blindis 7 jarojn pro katarakto. Nun ŝi estas kuracita per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino kaj denove komencis laboradi.



faringo kaj iam eĉ ulceriĝon. Kiam oni transfuzis al malsanulo nutrajn solvaĵojn, brako aŭ piedo de malsanulo devis esti fiksita kaj li ne povis moviĝeti dum dekelkaj horoj. Tio ofte kaŭzis varikon. Pro fastado malsanulo ne povis akiri sufiĉajn nutraĵojn, kio grave influis lian resaniĝon; sed nun antaŭ operacio oni ne bezonas enigi kanulojn, post operacio oni ne bezonas transfuzon kaj fastigon. En la tago de operacio, malsanulo jam povas ellitiĝi kaj en la sekvinta tago li povas promeni en malsanula ĉambro aŭ korto. Post operacio li povas manĝi likvajn nutraĵojn, post 2-3 tagoj li povas manĝi kaĉon, ovaĵojn, vermiĉelon kaj similajn nutraĵojn, kaj post unu semajno li jam povas manĝi tion, kion prenas sana homo.

Foje la hospitalo amputis subtotalan stomakon al iu paciento. La operacio iris sub akupunktura anestezo. Ĥirurgoj rapide malfermis la abdomenon, amputis la malsanan parton de la stomako kaj kunkudris la stomakon kaj inteston. Antaŭ finkudro kuracisto restigis trueton, enmetis tra ĝi kaŭĉukan kanulon kaj enverŝis 200 centilitrojn da medikamenta likvaĵo de la ĉina farmacio. La likvaĵo fluis en inteston kaj post nelonge la intestoj peristaltiĝis kiel lumbriko. Poste kuracisto deprenis la kanulon kaj fermis la trueton. Tiam la malsanulo sentis

soifon. Flegistino tuj donis al li duonkruĉon da akvo kaj li eltrinkis. Kuracisto observadis la fludadon de la akvo en la intestoj kaj atente kontroladis, ĉu likas la kunkudrita loko. Sed nenion malbonan oni trovis. Kuracisto kunkudris la ventron tavolon post tavolo. Reveninte en sian ĉambron la paciento jam povis trinki mandarinan sukcon sidante sur lito. En la sekvinta tago li jam povis sin sunumi en korto.

3

Hemoroidoj estas ordinara kaj ripetema malsano. Antaŭe la kuraca metodo por ne tre gravaj kazoj estis fomentado aŭ prenado de medikamento; tiu por gravaj kazoj — hemoroidoektomio. Operacio ofte postlasis sekvaĵojn. La metodo de la ĉina medicino estas nekrozigi hemoroidojn per medikamento, nome fari medikamentojn en najlan formon kaj enmeti ĝin en hemoroidojn por ke la hemoroidoj mem nekroziĝu kaj defalu. Tio estas pli bona ol operacio. Sed ankaŭ tiu ĉi metodo havas mankon: la medikamento ofte kaŭzas hidropson kaj paciento sentas akran doloron; iuj substancoj en la medikamento havas sekundaran efikon al malsanuloj kun



Kuracisto de Guang-anmen-hospitalo de Pekino faras klinikon pri kuraco de katarakto per metodo de kombino de la ĉina medicino kun la okcidenta.

nebona funkciado de koro, hepato aŭ renoj. Tial ankaŭ tiu ĉi metodo ne estas tre kontentiga.

Ĥirurgo Gin Hu de iu hospitalo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en la Interna Mongolio diligente esploris de 1962 kaj sur la bazo de nekroziga metodo, li kreis novan likvan nekrozigan medikamenton. En unu jaro, tiu likva medikamento jam kuracis pli ol 7,000 kazojn kaj pli ol 90 % sukcesis.

Kamarado Gin Hu kolektis dekkelkajn receptojn por kuraci hemoroidojn. Post analizado kaj esplorado pri ili, li fiksis la recepton, aldonis al ĝi kompare bonan sedativon de la okcidenta farmacio, faris sinsekvajn eksperimentojn kaj fine akiris sukceson. Kiam tiu ĉi likva medikamento estas injektita en hemoroidojn, ili mem nekroziĝas kaj defalas. Krome la medikamento mem povas kvietigi doloron. Tiu ĉi medikamento bone efikas, malmulte dolorigas, rapide resanigas kaj malgrandan sekundaran efikon kaŭzas. Ĝi estas facile preparbla, malmulte-kosta kaj bone akceptata de paci-

entoj. Maljuna laboristo Feng Gjukjun suferis 30 jarojn de internaj hemoroidoj de tria periodo kun anusprolapso, kaj krom tio li suferis 6 jarojn de sangofekado. Timante, ke operacio kaŭzos sekvaĵojn li konsentis nur aplikon de aliaj metodoj, tamen ili ne efikis al lia malsano. Nun post du fojoj de injekto de la medikamento la hemoroidoj jam tute malaperis. Maljuna laboristo Vang Likjuan suferis 24 jarojn de internaj hemoroidoj de tria periodo. Li estis dufoje operaciita, sed ne resaniĝis. Poste li akceptis dufoje injekton de la medikamento kaj jam tute resaniĝis.

4

Multaj malfacilaj malsanoj estas kuracitaj per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino.

En printempo de 1968, oni sendis al la hospitalo de Tengĝuang-komunumo de Ŝandong-provinco malsanulon de atrofio de cerbaj ĉeloj. Liaj atro-

fiitaj cerbaj ĉeloj superis 40 % . La paciento troviĝis en senkonsciiĝo kaj tremado. La medicinaj laborantoj de la hospitalo neniam renkontis tian kazon. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**savi mortantajn kaj helpi vunditajn, efektivi revolucion humanismon**” ili decidis ĉiamaniere resanigi la pacienton.

Post analizo ili sciis, ke la atrofiio de cerbaj ĉeloj estis kaŭzita de forta stimulo. Ili decidis apliki medikamentojn de la okcidenta farmacio por kvietigi angoron kaj doloron kaj nutri nervojn; apliki la ĉinajn medikamentojn por fortigi la korpon de la malsanulo, apliki novan metodon de akupunkturo por rehavigi al nervoj kapablon. Kiam la parto de la malsanulo iom boniĝis, ili helpis lin forigi skrupulon kaj malpaciencon, kaj starigi memfidon venki la malsanon kaj postulis lin iniciate kunagi kun la kuracistoj. Post kuraco de pli ol unu jaro, la paciento resaniĝis kaj revenis al sia laborposteno.

En iu aŭgusta tago de 1969, la hospitalo akceptis malsanulon kun aĝo de ĉ. 20 jaroj. Turmentite de malsano, la junulo aspektis kvazaŭ skeleto. Lia malfortega korpo kuntiriĝis kaj spasmis. Krom la okuloj, neniu parto de lia korpo povis moviĝeti laŭ lia volo.

Foje tiu ĉi junulo falis de sur ĉaro 2 metrojn alta kaj tuj svenis. Dank’ al urĝa savo li rekonsciĝis. Post kuracado de pli ol 3 monatoj en iu hospitalo li fartis iom pli bone. Sed li ne tute resaniĝis kaj post elhospitaliĝo denove graviĝis lia malsano. Sur la bazo de sukcesa kuraco de atrofiio de cerbaj ĉeloj, la medicinaj laborantoj de la hospitalo havis la certecon resanigi la malsanulon. Ili detale ekzamenis la malsanulon, atente esploris la malsanon, elfaris planon de kuraco per la ĉina kaj okcidenta medicinaj kombino. Flegistinoj tagnokte gardis ĉe la malsanulo por doni al li trinkaĵojn, manĝaĵojn kaj medikamentojn. Por trovi plej trafan akupunkturitan punkton por ke la paciento povu movi la membrojn, kuracistoj pikis preskaŭ ĉiujn stimulaĵajn punktojn sur sia gambo kaj fine trovis novan punkton. La kuracistoj de la ĉina medicino tagnokte observadis la evoluon de la malsanulo por ĝustatempe doni pli efikan recepton. Post kuracado de 6 monatoj, la malsanulo, kiu antaŭe povis movi nur la okulglobojn, jam povis stari. Li kriis emocie: “Vivu Prezidanto Maŭ!”


Kuracado per la ĉina kaj okcidenta medicinaj kombino ne nur ebligas al pacientoj eviti operacian vundon kaj elspezon de multe da mono kaj tempo, sed ankaŭ estas facile disvastigebla, tial ĝi estas bone akceptata de pacientoj.




EN TIBETO KONSTRUIĜIS MALGRANDA SUKERFABRIKO

La sukerfabriko de Pengbo-kultivejo en la Tibeta Aŭtonoma Regiono finkonstruiĝis kaj komencis funkcii. Antaŭ la Liberiĝo sukero bezonata de Tibeto estis tute importita kaj tiel kara, ke nur la regantaj klasoj povis aĉeti ĝin. Post la Liberiĝo granda kvanto da sukero estis ĉiujare transportita de niaj internaj regionoj al Tibeto. La zorgo de la Partio kaj registaro al la tibetaj popoloj vekis ĉe ili revolucionan spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj por ŝanĝi la postĝintan fizionomion de Tibeto. Post klopodo de pli ol kvar monatoj ili finkonstruis tiun malgrandan sukerfabrikon.

La Pekina Fabriko de Smirga Rado, la Fizika Instituto kaj la Dinamika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj sukcese kombinis diamanton per eksploda metodo, kiu estas pli simpla kaj pli malmultekosta ol la metodo de statika ultrapremo. Jen estas diamantoj sub lupeo kombinitaj per metodo de dufoja eksplodo.





Laringa Protezo de Nova Tipo

IU ajn, se li perdos la laringon, li fariĝos mutulo kaj lia nazkavo perdos la funkcion. Sed la laringa protezo de nova tipo kreita de la Dependenda Hospitalo de la Medicina Instituto de Ŝandong-provinco de nia lando ne nur povas paroligi tiujn kiuj perdis la laringon, sed ankaŭ povas restarigi funkcion de ties nazkavo. La laringa protezo de nova tipo estas farita per speciala materialo. Ĝi estas firma, longe uzebla, ne ekscita al homo kaj tute konforma al la fiziologia postulo de homo. Ĝi havas specialan enirejon de buŝo, tiel ke la buŝo povas libere moviĝi kaj klare elparoli vokalojn kaj konsonantojn; ĝi havas duklapan moveblan sonigilon, kiu povas imiti la funkcion de voĉkordoj de sana homo kaj laŭplaĉe reguligi akrecon kaj fortecon de sono; ĝi havas spiradan kontrolilon, dank' al kiu la aero fluas kiel ĉe sanulo, unue tra la nazkavo kaj poste en la pulmojn, dank' al kio la nazkavo reakiras la funkcion de flaro kaj tiun de varmigo, humidigo kaj filtrado al la aero.

La kuracistoj, kiuj partoprenis en la esplorado kaj fabrikado de la laringa protezo, diris, ke la protezo naskiĝis post ripetada provo kaj disvolviĝis kaj perfektigiĝis iom post iom ĝis la nuna nivelo.

En 1958, la jaro de impeto de nacia ekonomio de nia lando, kelkaj junuloj, kiuj estis ĵus diplomitaj el medicina instituto, decidis krei instrumenton kiu povas rehavigi parolpovon al laringoperdintoj. Ilia intenco ricevis subtenon de la partia organizo en la hospitalo kaj ili organizis esploran grupon kaj komencis labori.

Tiam mankis al ili ekipaĵo, sperto kaj koncerna literaturo. Sed la kamaradoj de la grupo firme kredis, ke ĉia malfacilo povas esti venkita sub la

konduko de Maŭzedongpenso, sub la gvido de la Partio kaj sur la bazo de la saĝo de amasoj.

Komence ili elpensis kelkajn projektojn, sed ĉiuj malsukcesis. Kie kuŝas la kialo de la malsukcesoj? Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri enketado kaj esplorado, ili faris detalan observadon kaj analizon al paciento perdinta laringon kaj sanaj homoj kaj plie konis, ke senĝena parolo de sana homo efektiviĝas per kunlaboro de la pulmoj, gorĝo kaj buŝkavo sub direktado de la cerbo. La pulmoj liveras sufiĉan aerfluan kun certa premo kaj la aerfluo sonas en kunago de la laringo kaj voĉkordoj. La aerfluo kaj la sono iras en la buŝkavon, kaj per resonado, akorda ago kaj modifo per la lipoj, dentoj kaj palato, ili formas parolon. Paciento perdinta laringon havas sendifektajn pulmojn kaj buŝkavon, sed ne povas enlasi aerfluan el la pulmoj en la buŝkavon, tial ne povas produkti sonon. Se oni kreas racian artefaritan sonigilon por anstataŭigi la perditan laringon kaj pasejon kiu povas plene disvolvi la funkciojn de la pulmoj kaj buŝkavo, oni povas denove paroligi la pacientojn.

Por projekti racian sonigilon, ili sekis spiradan organon kaj sonan organon de rano ĝis homo. En la komenco ili provis konduki la aerfluan el la pulmoj per kaŭĉuka tubeto. Por sukcesigi tion ili faris pli ol cent provojn. Kaj fine ili elfaris la unuan laringan protezon de nova tipo.

Klinika praktikado pruvis, ke la laringa protezo fundamente atingis la esperatan rezulton. Post senĉesa plibonigo kaj perfektigo la sono de laringa protezo fariĝis pli kaj pli klara. Per tiu aparato, paciento reakiris parolpovon. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la esplora grupo

faris pluan studon kaj la laringa protezo povas esti fikse adaptita, tiel ke la paciento ne bezonas teni ĝin en mano dum parolado kaj ankaŭ la funkcio de nazkavo restariĝis. La laringa protezo fariĝis pli kontentiga.

Iu paciento speciale venis de Hongkongo por adapti laringan protezon de tiu nova tipo. En Hongkongo lia laringo estis amputita kaj li mutis pli ol 1 jaron. Li uzis elektronan laringan protezon fabrikitan de alia lando, tamen li ankoraŭ ne povis paroli. Nun li jam povas klare paroli kaj distingi odorojn uzante laringan protezon de nova tipo.

Ankaŭ pacientoj en diversaj lokoj de nia lando, kiuj adaptis tian laringan protezon, skribis leterojn al la hospitalo por laŭdi, ke la laringa protezo de nova tipo, kiu liberigis ilin de muteco estas nova sukceso de medicino.



Al maljuna laboristo Jang Hingje de la Lampogloba Fabriko de Ŝenjang estis adaptita la ĉina laringa protezo. Li ĝoje telefonas al sia familio.

Medicinaj laborantoj instruas pacientojn en ekzerco de parolo.



La Ĉina Reprodukta

Presarto per

Lignogravuro

POR ŝatantoj de belarto, kaj precipe por tiuj de ĉinstilaj pentraĵoj, nefremdaj estas re-produktitaj bildoj presitaj per ĉina tradicia ligno-gravura arto. Ili scias, ke tiaj bildoj diferencas de la ordinaraĵoj de reproduktitaĵoj de pentraĵoj. Pro tio, ke la materialo uzata en presado estas eksterordinara kaj la procedo diferencas de tiuj de ordinaraĵoj presaj metodoj, oni ofte aprezas tian re-produktaĵon kiel originalon kaj rigardas tiun presadon kiel rekreadon de pentrarto.

Kial la disvolviĝinta moderna presarto ne povas anstataŭi la metiarhton de reprodukto per lignogravuro?

Tion vi komprenos, post trarigardo de la tuta procedaro.

La tuta produkta procedaro konsistas el kvar eroj, nome desegnado, gravurado, presado kaj enkadrigo.

Desegnado: Pentristo faras kopiajn desegnojn de originalo por fari lignogravurajn presplatojn tiamaniere, ke ĉiu el ili portas la samkoloran parton. Kiom da koloroj la originalo havas, oni devas fari tiom da presplatoj. Por reprodukti pentraĵon kun malmultaj koloroj kaj nuancoj, oni devas fari kelkajn ĝis dekelkajn presplatojn, kaj por reprodukti delikatajn kaj komplikajn pen-

traĵojn, oni devas gravuri dekojn, centojn eĉ ĉirkaŭ milon da presplatoj. La desegnoj por tiaj presplatoj devas esti faritaj sur travidebla papero.

Gravurado: Oni gluas inversigitan desegno-paperon sur lignan tabulon por gravurado. Por versimile reaperigi la spiriton kaj pentromanieron de la originalo kaj vivece prezenti ĝiajn teknikojn kaj strekojn, la gravuristo devas zorge studi la originalon.

Presado: Post pretigo de la presplatoj, oni komencas presi sur speciala papero per ili pecon post peco laŭ la originalo, tiel ke koloroj kaj strekoj aldoniĝas al la paperpeco unu post alia ĝis pretigo de la tuta bildo. La presanto nepre devas ĝuste prezenti la nuancojn, ostecajn strekojn kaj aliajn pentrajn teknikojn.

Enkadrigo: Aldoni al la presita bildo per gluado paperon sub kaj ĉirkaŭ ĝi laŭ ĉina tradicia maniero, tiel ke ĝi formu kompletan rulpentraĵon similan al la originalo por esti longe pendigita kaj konservita.

La tuta procedaro de farado de tia reproduktaĵo postulas ke oni zorge studu kaj plene komprenu la originalon. Ili povas reprodukti la originalon versimile en formo kaj spirito, nur se ili bone konas

kaj plene komprenas la spiriton, stilon kaj strekadon de la originalo.

Tial la moderna presarto, kiu povas grandkvante kaj rapide produkti presajojn forme similajn al la originalo, ne povas anstataŭi la tradicion arton de reprodukto de pentraĵoj per lignogravuro, precipe en reprodukto de ĉinstila pentraĵo kun komplikaj nuancoj kaj varioj de koloroj. Kvankam la moderna kolorpresarto per maŝinoj povas konservi la formon de la originalo, tamen ĝi ne povas sentigi al la rigardantoj la verajn strekajn gustojn, kaj ne povas prezenti la belon kaj spiriton de la ludoj de peniko kaj koloroj en ĉinstila pentraĵo. Male, la papero, ĉina inko kaj koloroj uzataj en reprodukto per ĉina tradicia lignogravura metodo estas ĝuste tiuj uzataj en kreado de ĉinstilaj pentraĵoj, kaj pli grave estas tio, ke la presantoj profunde komprenas la spiriton kaj artan teknikon de la originalo, lerte manipulas la instrumentojn dum la presado, tiel ke la reproduktaĵo povas perfekte prezenti komplikajn variojn de linioj kaj koloroj en ĉinstila pentraĵo, kiel ekzemple ostecajn, grasajn, molajn kaj fortajn liniojn, sekajn, malsekajn, pezajn kaj malpezajn strekojn kaj diversajn nuancojn de koloroj, ke la reproduktaĵo tre similas al la originalo ne nur en formo sed ankaŭ en spirito.

Krome, la pentraĵo reproduktita per la tradicia metodo estas presita parton post parto laŭ la originalo, tial oni povas reprodukti ĉinstilan pentraĵon de ia ajn grandeco. Ankaŭ en tiu ĉi rilato la metodo havas nekompareblan avantaĝon super tiu de la maŝina presado.

La reprodukta arto de pentraĵoj per lignogravuro estas tradicia presarto kreita de la ĉina popolo. Ĝi jam havas historion de pli ol mil jaroj. Oni jam trovis lignogravuraĵon presitan en la naŭa jarcento p.K. Post Tang-dinastio (618-907 p.K.), multaj el la libroj de la pli kaj pli disvolviĝintaj sciencoj, literaturo, teatra arto kaj aliaj enhavis fajnajn ilustraĵojn presitajn per tiu metodo. Tiu-tempe la gravura arto jam atingis relative altan nivelon kaj povis lerte produkti liniojn fortikajn kaj graciajn. En Ming-dinastio (1368-1644 p.K.), aperis kolora presarto. Dum la reg-periodo Ĉongĝeng (1628-1644 p.K.), Hu Ĵicong kompilis kaj presis per lignogravuro *Bildpaperojn de Ŝiĝuĝaj* kaj *Kolekton de Pentraĵoj* en koloroj. Ne nur la koloroj estis precize presitaj unu sur alia sed ankaŭ la nuancoj de ili estis nature kaj vivece prezentitaj kiel en pentraĵoj faritaj per peniko, dank' al uzo de akvaj koloroj en presado per ligna presplato. Tio levis la reproduktan presarton per lignogravuro al nova nivelo.




Metiartisto de lignogravura reprodukto en laborado


Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, sub la direktado de la proletara revolucia literatura kaj arta linio de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ, la tradicia reprodukta presarto per lignogravuro ricevis ankoraŭ pli bonan disvolviĝon. Ĵongbaŭĝaj de Pekino kaj Duojunhuan de Ŝanhajo, kiuj sin okupas per presado de reproduktaĵoj per lignogravuro, disvolviĝis el metiejoj en specialajn presejojn. Ili eldonis milojn da reproduktaĵoj de antikvaj kaj nuntempaj fame konataj pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj, tiel ke la reprodukta presarto per lignogravuro fariĝis distinginda rimedo por reprodukti ĉinstilajn pentraĵojn kaj ĉinajn kaligrafiaĵojn. Laŭ la principo **“utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo, evolvi novon el malnova”**, la artistoj ne nur reproduktis multajn famajn klasikajn pentraĵojn ĉinstilajn, sed ankaŭ novajn verkojn de modernaj pentristoj kun aktualaj kaj revoluciaj enhavoj, kiel ekzemple *La Ruĝa Suno Brilas super Jan-an* kaj *Hidroelektrajo de Hin-an-rivero*. De la komenco

de la granda kultura revolucio, la aktiveco kaj kremo de la artistoj ricevis pliapaŝan disvolviĝon. Ili sukcese reproduktis la manuskripton de la brila poemo de Prezidanto Maŭ *Longa Marŝo*, kun longeco de pli ol 5 metroj. Kaj krome ili adaptis la revolucian historian olepentraĵon *Prezidanto Maŭ Iras al Anĵuan* al tia lignogravuro kaj per tio levis la reproduktan presarton per lignogravuro al nova nivelo.

La reprodukta presarto per lignogravuro estas unu el la gravaj atingoj de la kulturo kaj arto de la ĉina popolo kaj ĝi ankaŭ akcelis la kulturen interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj. En la pasintaj pli ol 20 jaroj de post la fondiĝo de la nova Ĉinio, reproduktaĵoj de pentraĵoj per lignogravuro trovis vastajn amasojn de aprezantoj kaj ricevis altan takson. Ili ofte aperis en ekspozicioj en kaj ekster Ĉinio kaj estis multe laŭdataj de artistoj kaj eksterlandaj amikoj.

Procedaro de la ĉina reprodukta presarto per lignogravuro





Vinbera vazo (el jado)








Supre maldekstre: Danco kun ruĝa silka rubando (el ligno)

Malsupre maldekstre: Malgranda pentristo (el porcelano)

Dekstre: Amikeco (el argilo)







Maldekstre supre: Cervidoj (el fajenco)

Meze supre: Vazo (bambua plektajo)


Malsupre maldekstre: Pavo kaj peonioj (el konkvoj)

Dekstre: Peonioj (mozaiko el konkopecetoj)



Flora vazo (el ruĝa koralo)





Duhiu-monto de Gujlin (lana brodaĵo)

Ŝpardepono de Higu- kvartalaj Laboristoj

LA filio de la Ĉina Popola Banko en Higu-kvartalo de la urbo Langou, Gansu-provinco starigis 9 ŝparkasojn apud fabrikoj kaj laboristaj kvartaloj. La deponita sumo de tiuj ŝparkasoj en 1971 pliiĝis je 52% ol tiu en 1965 antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio. 75 procentoj de laboristoj de la tuta kvartalo havas deponitan ŝparmonon.

Antaŭ la Liberiĝo, Higu estis dezerta tombejo, sed hodiaŭ ĝi jam fariĝis industria kvartalo nove konstruita ekde la jaro 1956. Tie konstruiĝis unu post alia fabrikoj de kemia industrio, ŝpinteksado, vitro kaj kemiaj fibroj, petrola rafinejo kaj termoelektrajo. Krome ankaŭ malgrandaj entreprenoj kaj fabrikoj funkciigataj de samkvartalanaj estas starigitaj. Nun ĝi havas pli ol 100 grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn industriajn entreprenojn kaj pli ol 50,000 laboristojn.

Hodiaŭ prosperas Higu. Kun la disvolviĝo de industria produktado, iom post iom altiĝis ankaŭ la vivnivelo de la laboristoj, el kiuj multaj havas superbezonan monon por deponi en ŝparkaso.

Vang Gian estas unu el la ŝpardeponantoj de Higu. Antaŭ 1956 li estis kamparano, kaj poste li fariĝis laboristo. En la komenco, li laboris en la fabriko 302 sub la Kemia Kompanio de Langou kiel portisto, kaj poste kiel lokomotivisto. En la pasintaj pli ol dek jaroj, lia salajro iom post iom altiĝis, nun ĝi estas je 90% pli multa ol tiu je lia eniro en fabriko, kaj ankaŭ liaj aliaj familianoj havas certajn enspezojn; tial lia familio kun 10 anoj vivas feliĉe kaj havas ŝparmonon en ĉiu monato por deponi en ŝparkaso. Parolante pri la vivo de Higu-aj laboristoj, li ĉiam ĝoje diris: "La lando prosperas, la popolo vivas feliĉe, kaj la vivo de ni laboristoj boniĝas jaron post jaro."

En Higu troviĝas nombro da malnovaj laboristoj, kiuj delonge deponas monon en la ŝparkaso. En la malnova socio ili vivis tragike. Post la Liberiĝo, garantiataj estas ne nur iliaj laboro kaj

salajro, sed ankaŭ iliaj gefiloj povas ricevi laboron laŭ aranĝo de la ŝtato en konvena aĝo; kaj krome ilia lupago por loĝejo estas malmulta kaj la prezoj de varoj estas stabilaj, tial ĉiam plimultiĝas ilia deponita mono en banko.

Ĝang Dianĝeng, 63-jara laboristo de la 5-a Kompanio de Kemi-industriaj Konstruaĵoj de Langou estas unu el la malnovaj laboristoj, kies vivo en la nova socio evidente diferencas de tiu en la malnova socio. Nun li havas kurantan kaj periodan ŝpardeponojn en ŝparkaso. Antaŭ la Liberiĝo li laboris en la Nordoriento. Tiam li ne povis vivteni eĉ per penlaborado siajn tri infanojn. Liaj unuaj gefiloj mortis de manĝado de herboj. Post la Liberiĝo, Ĝang Dianĝeng vivas en tute nova aspekto: Li laboras en ŝtata fabriko, lia edzino laboras en fabriko funkciigata de samkvartalanaj, kaj el liaj 5 filoj 3 eniris fabrikojn kaj 2 aliĝis al la Popola Liberiga Armeo, tial tre multiĝis la enspezo de la tuta familio. Sed, la elspezo por vivtenado ne pliiĝis. La kaŭzo kuŝas en tio, ke la prezoj de grenoj, karbo, akvo, elektro kaj lupago por loĝejo de lia familio restas stabilaj de dek kelkaj jaroj kaj iuj el ili eĉ malaltiĝis, ekzemple la prezoj de medikamentoj reduktiĝis je 80% kompare kun tiuj en 1955. En la lastaj du jaroj, la fabriko provizis al li gason por kuiri, por kio ĉiumonate li elspezas nur 1 juanon. Kaj la kvin familianoj, kiuj laboras en fabrikoj, ĝuas ankaŭ senpagan kuracon. Tial la familio de Ĝang Dianĝeng vivas pli kaj pli feliĉe kiel aliaj laboristaj familioj de Higu. Lia familio aĉetis 5 brakhorloĝojn, 2 radioricevilojn, 3 biciklojn, 1 kudromaŝinon kaj ankaŭ lanajn litkovrilojn kaj peltaĵojn. Pro tio li ofte diris: "En nia lando, ja estis tre multaj mizeruloj kiel mi antaŭ la Liberiĝo, dum hodiaŭ ja tre ordinaraj estas feliĉuloj kiel mi. Ja estas la bona gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, dank' al kiuj ni povas ĝui tian vivon!"

Jarfina Distribuo de Unu Produktogrupo

MULTAJ legantoj skribis al nia redakcio, ke EPC raportu la enspezan distribuon de komunumo de nia lando. Nun ni rakontas al vi la jarfinan distribuon de la 7-a produktogrupo de Huajdi-brigado de Huajdi-komunumo en antaŭurbo de Ŝigiaĝuang, Hebej-provinco, kiun ni vizitis lastatempe.

En la produktogrupa estas 105 familioj kun pli ol 400 homoj. Ĝi produktas ĉefe grenon kaj legomojn. En 1971 ĝi refoje akiris riĉan rikolton. La pomua produktokvanto de greno atingis 729.5 kilogramojn, je pli ol 9% pli multe ol tiu en la riĉrikolta jaro 1970. Ankaŭ abunda rikolto de legomoj estis akirita.

Ni alvenis al ĝi ĝuste en la tempo kiam ĝi publikigis sian jarfinan kalkulon. En la oficeja korto troviĝas ruĝa afiŝo, sur kiu oni povas vidi jenajn liniojn: La totala enspezo de agrikulturo kaj flankproduktoj estas 111,400 juanoj, 13.7% pli multe ol tiu en 1970. Post dekalkulo de produktokosto kaj pago de agrikultura imposto, restas ankoraŭ 93,000 juanoj kiel neta enspezo.

Ni demandis al la librotenisto de la produktogrupa: “Kiom da elcentoj la agrikultura imposto okupas en la totala enspezo?”

“Ordinare ĉirkaŭ 6%,” li respondis. “Por disvolvi agrikulturon, la ŝtato nun ne altigas la agrikulturan imposton, eĉ en kazo de pliprodukto. Ĉar ni havis riĉajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj, la elcento de agrikultura imposto reduktiĝis jaron post jaro, en 1971 ĝi okupis nur 2.3% en la totala enspezo.”

“Kiel vi distribuas vian netan enspezon?”

“22% estas disponitaj de la kolektivo kiel akumulita kapitalo kaj bonstatiga fonduso uzataj

por kampa kaj akvoutiliga konstruado, aĉeto de agrikulturaj maŝinoj kaj monhelpo al koope-
ra kuraco kaj familioj kun malmulta enspezo. La restaj 78% estas senpere disdonitaj al komunumanoj.”

La disdonita monsumo estas je 20% pli multa ol tiu en 1970 kaj la komunumanoj estas tre kontentaj.

En 1971, la komunumanoj de la produktogrupa laboris pli ol 50,000 labortagojn. Por ĉiu labortago oni povas ricevi 1.28 juanojn, t.e. 1.9-oblo de tiu en la komenca periodo post la komunumigo.

La produktogrupa okazigis kunvenon en kiu la librotenisto proklamis la enspezojn de ĉiu familio. Plejparto de la familioj ricevis pli multe ol en 1970. Post la kunveno la komunumanoj ĝoje iris al la produktogrupa oficejo por preni sian ricevandan monon.

Ni vizitis ankaŭ la produktogrupan estron kaj demandis al li: “Kia estas la diferenco de vivnivelo inter la familioj kun malsamaj nombroj da anoj kaj laborfortoj? Krome, kion vi faras por komunumano kiu suferas de neatendita malfeliĉaĵo? Kaj kiel vivas maljunuloj sen gefiloj?”

“Al ĉiu laŭ la laboro estas la principo de komunuma distribuo,” li respondis. “Tial ja estas diferenco, sed ne granda, kaj iom post iom malgrandiĝanta. Ĉe ni al neniu mankis manĝo kaj vesto, troviĝas neniu ŝuldanto kaj nenia polariĝo inter riĉeco kaj malriĉeco. Estus pli bone se vi irus al komunumanaj hejmoj por vidi kiel ili vivas.” Montrante maljunulon inter la amasoj li prezentis lin al ni: “Lia nomo estas Ĉen Hinĉeng kaj lia familio havas relative multe da laborfortoj. Ĉu vi volas interparoli kun li?”

La maljunulo ĝoje salutis nin kaj kondukis nin al sia hejmo. Li havas 4 ĉambrojn fronte al sudo kun korto. La ĉambroj estas tre varmaj kaj plenaj de sunradioj. Rimarkinte ke ni ŝatas tiujn ĉambrojn, la maljunulo diris bonhumore: “El tiuj ĉambroj tri estas novaj. Nemalmultaj el la komunumanoj de nia grupo konstruis por si novajn domojn.”

La maljunulo rakontis al ni: Antaŭ la Liberiĝo li laboris por bienulo kiel tag-kaj jar-dungito, suferante de malsato kaj frosto. Nun li estas 64-jara kaj la 5 membroj el lia familio ĉiuj partoprenas laboron. En la jarfina distribuo de 1971, lia familio ricevis pli ol 800 juanojn, krom grenon por la tutjara konsumo. “Ĉion ĉi tion ni dankas al la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ!” Li diris emocie.

Adiaŭinte la maljunulon, ni venis al flankmanĝa prilaborejo por viziti komunumaninon Hiaŭ Lan, kies familio antaŭe vivis en plej malfavoraj kondiĉoj. Ni petis ŝin paroli pri la spezo de sia familio. Ŝi diris ke ŝi laborgajnis en 1971 150 juanojn krom la ricevita greno por la tutjara konsumo de 3 homoj de ŝia familio, tiu sumo plus ŝia enspezo de unu kaj duona porkoj venditaj al la ŝtato atingis entute 265 juanojn. Ŝi diris al ni: “Lastjare mia familio renkontis grandajn malfacilojn. Sed nun mia stato boniĝis.” Antaŭ kelkaj jaroj, ŝia edzo grave malsaniĝis kaj la produktogrupo pagis por ŝi la kuracon el la bonstata fonduso. Ŝia edzo mortis en 1969 postlasante al ŝi du infanojn, tial estis malfacile por ŝi vivteni la familion. La produktogrupo provizis senpage al ŝia familio tutjaran grenon kaj sumon da kontanta mono. Hiaŭ Lan diris: “Mi tre dankas al nia komunumo, ke ĝi tiel zorgis min. Se la malfeliĉo okazus antaŭ la Liberiĝo, mi povus fari nenion alian ol forvendi miajn gefilojn.”

Ni petis ŝin rakonti al ni, kiel ŝi povis bonigi sian familian ekonomion. Ŝi diris, ke la produktogrupo asignis al ŝi laborojn kiel eble plej multe laŭ ŝia farto por pliigi ŝian enspezon kaj ankaŭ ŝi mem laboris diligente, tial ŝi venkis la malfacilon en ekonomio post nur unu jaro. Nun ŝia enspezo atingis la mezan nivelon de la produktogrupo. Dum la periodo de la Printempa Festo ŝia familio havis 35 kilogramojn da porkaĵo por sia bezono. “Nun en nia produktogrupo neniuj familioj vivas en malfacilo,” ŝi aldonis. “En nia grupo kelkaj familioj antaŭe vivis kompare malfacile, sed nun ilia stato boniĝis sub la helpo de la kolektivo.”

Ŝia rakonto memorigis al ni la vortojn de la produktogrupo estro: “Nenia polariĝo inter riĉeco kaj malriĉeco troviĝas en la komunumo.”

Kiel vivas la maljunuloj sen gefiloj? Kun tiu demando ni vizitis avinon Ding Langie.

“Kiom da jaroj vi havas, avino?” Ni demandis ŝin.

“Laŭ via supozo?” La avino parolis laŭte kaj viglanime.

“Ĉu sesdek?”

“Jam sepdek tri!” Ŝi ridegis.

Ŝiaj tri samfamilianoj mortis sinsekve antaŭ kaj post la Liberiĝo. Post kiam ŝi maljuniĝis kaj perdis sian laborkapablon, ŝi ĉiam ricevis prizorgon de la kolektivo. “Manĝon, veston kaj kuracon ĉion mi ricevis de la produktogrupo,” diris la avino. “Ankaŭ poŝmonon ĝi donas al mi ĉiumonate. La komunumanoj traktas min kiel sian samfamilianon.”

Ni trovis en grentenejo la produktogrupan estron, kiu estis kontrolanta la kolektivajn rezervajn grenon. Li demandis al ni ĉu ni ankoraŭ volas interparoli kun iu. Ni respondis: “Nun ni deziras refoje paroli kun vi mem. Ĉu iom pli alta estas la enspezo de vi kadroj?”

Li diris: “Ĉiutage mi laboras kiel ordinaraj komunumanoj, ricevante samajn poentojn por sama laboro kiel la aliaj. Vespere mi okazigas kunvenon por diskuti produkton kaj aliajn aferojn de mia produktogrupo. Mi estas elektita de ĉiuj grupanoj kaj tio signifas ke ili fidus al mi, tial mi devas servi al ili tutkore kaj plenanime. Se mi konsiderus pri mia individua profito, mi ne meritus la titolon de produktogrupo estro!”

Nia vizito finiĝis per lia sincera respondo.






POŝTADO EN HINGIANG

En la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono rapide disvolviĝas la poŝta afero. Nun en la regiono la totala longeco de la poŝtaj linioj estas 10-oblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo, kaj la longeco de linio de poŝta aŭto kreskis pli-ol-25-oble. Dank' al vasta apliko de modernaj komunikiloj multe rapidiĝis la transportado de gazetoj, ĵurnaloj kaj leteroj kaj plifortiĝis la interligo inter la landlimaj diversnaciaj popolanoj kaj tiu inter tiu limregiono kaj la internaj regionoj de la patrujo.

Antaŭ la Liberiĝo la poŝto en Hingiang estis tre postiginta. Tiam en 2-3 gubernioj troviĝis nur unu malgranda poŝtofiĉejo. Pli ol duono de la guberniaj urboj ne havis poŝtan servon, por ne paroli pri la vastaj kamparoj kaj paŝtregionoj. Preskaŭ unu monato estis bezonata por transsendi leteron de Urumĉi al Altaj kaj 40-50 tagoj estis bezonataj por transsendi leteron de internaj regionoj al Urumĉi. Nun fervojo kaj aera linio interligas Urumĉi kaj internajn regionojn. Urumĉi, la ĉefurbo de Hingiang, havas aerajn kaj aŭtajn liniojn kondukantajn al Altaj, Jining, Hetian, Kaŝi, Aksu, Kuĉe kaj aliaj lokoj. La poŝtofiĉejoj de tiu regiono tre zorgas pri poŝta konstruado en kamparo kaj paŝtregionoj. En la plejparto de popolaj komunumoj establiĝis poŝtaj servejoj kaj poŝtaj linioj interligas la plejparton de la produktaj brigadoj.

ARTA KOVADO DE KORTOBIRDOJ

Teknikistoj kaj laboristoj de la kortobirda bredejo de Giangdu-gubernio, Giangsu-provinco resumis sperton pri reguligo de temperaturo laŭ la evoluo de la embrio en ovo kaj posedis leĝojn de eloviĝo de kortobirdoj. Dank' al apliko de nova metodo, la procento de la elovigitaj kaj vivipovaj kortobirdoj leviĝis de 50% al 98%, kaj tiu metodo estas aplikebla en ĉiu ajn sezono. Nun ilia sperto estas disvastigata en Giangsu, Ĝegiang, Ŝanhajo, Guangdong, Guanghi k.a.



En Ŝandong-provinco oni finkonstruis elektran irigacian sistemon por konduki akvon de la Flava Rivero. Sur la foto estas duŝtupa pumpstacio de ĝia Pingjin-Tianŝan-a irigacia sistemo, kiu havas 10 tubojn de 1.2-metra kalibro kun flukvanto de 18 kubmetroj po sekundo kaj povas irigacii kampojn trans monto alta je 57 metroj tra kanaloj serpentumantaj ĉirkaŭ montoj per akvo de la Flava Rivero post sedimenta traktado.

La Pekina Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko en Konstruado


SKALO KAJ RAPIDECO


Veturante ekde Pekino per aŭto sudokcidenten, post horo vi atingas la Feniksan Monton. Antaŭ 3 jaroj tiu loko estis senhoma, sed nun jam fariĝis bolanta konstruejo. En la 10-kilometra valo staras gigantaj petrolrafinaj turoj kaj aliaj kemiindus-

triaj ekipaĵoj, oleaj tuboj kaj alttensiaj kabloj kruciĝas unuj super aliaj. Ambaŭflanke de monta ŝoseo viciĝas novaj loĝkvartaloj, hospitalo, lernejoj kaj magazenoj.

Tio estas la konstruata Pekina Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko.


Rapide progresas la junaj laboristoj.





Inĝeniero kaj laboristoj kune interkonsiliĝas pri plibonigo de la teknologio de molekula kribriĵo de senvaksigo.

Parto de la petrolrafinaj ekipaĵoj de la Pekina Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko



LA KONSTRUANTOJ EN STREĈA LABORADO

La konstruado de tiu ĉi moderna petrol-kemia kombinumo komenciĝis en oktobro de 1968. En la konstruado, plenumante la ĝeneralan linion elaboritan de Prezidanto Maŭ "streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie" kaj sur la bazo de niaj ekzistantaj kondiĉoj, laboristoj kaj teknikistoj de nia lando mem projektis, fabrikis kaj muntis la ekipaĵojn. La konstruado iras rapide. Ĝis nun ili jam konstruis 15 kompletojn de rafinaj kaj kemiindustriaj ekipaĵoj, kaj la ĉefaj produktaĵoj estas benzino, mazuto, eleeca lubrikaĵo, parafino, sinteza kaŭĉuko, sinteza fibro, sinteza plasto, fundamentaj kemiindustriaj materialoj, kemisterkoj k.a. La profito akirita de la rafina parto sola post komenco de produkto jam egalas al 70% de la totala investo de la ŝtato.


La supre menciitaj estas nur la finkonstruitaj partoj de la tuta konstrua plano kaj unuaj fruktoj. Post finkonstruo, la fabriko havos 35 kompletojn de produktaj ekipaĵoj, aliajn konformajn helpajn ekipaĵojn kaj bonstatigajn instalaĵojn. Krom diversaj hejt-oleoj, lubrikaĵoj, parafino, likvigitaj gasoj, la fabriko produktos entute ĉ. 100 specojn de petrol-kemiaj produktaĵoj, post sinteza utiligo de vostgaso de petrolrafinaj ekipaĵoj, benzolo kaj malpezaj oleoj. Por efektiviĝi la konstruan planon la laboristoj sin okupas samtempe pri produktado kaj streĉa konstruado.

Nun preskaŭ ĉiutage alvenas multaj vizitantoj. Ankaŭ fremdlandanoj ĝin pririgardis kun granda intereso. El la giganta ŝanĝiĝo de la dezerta montvalo en la mallonga tempo, oni vidis la saĝon kaj kreivon de la bravaj konstruantoj.

Estis vintro de 1968. Pli ol dek miloj da laboristoj venis de la Nordoriento, Nordokcidento kaj Ŝandong-provinco malgraŭ densa neĝado. Antaŭ ili estis senhoma montvalo plene kovrata de granitaj rokoj kaj dornaj veproĵoj. Ilia tasko estis: Antaŭ la 1-a de oktobro de 1969, nome la 20-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ili devos finkonstrui tri kompletojn de rafinaj ekipaĵoj de atmosfera kaj vakua distilado, senviskozecigo kaj kataliza krakigo kaj komencos produkti oleojn.

La tempo estis mallonga, la tasko peniga, la konstruaj maŝinoj malmultaj kaj la malfaciloj grandaj. Sed la firma volo de laboristoj estis neŝancelebla. Ili lernis de la Daking-aj laboristoj la revolucion spiriton de penema luktado kontraŭ malfaciloj kaj komencis intensan konstruadon.

Sur la krutaj rokoj konstruantoj ligis sin per ŝnuro je la talio por bori mintruojn. En surdiga bruo de eksplodo disfalis rokoj. Ĉar la maŝinoj ne povis rapide forigi la ŝtonojn, laboristoj helpis per ĉaretoj kaj korboj. Kiam kamionoj



ne sufiĉis por transporti dekmilojn da tunoj da ekipaĵoj, laboristoj transportis per ŝultroj aŭ tiradis kiel la Daking-aj laboristoj en konstruo de Daking-petrolkampo.

En konstruado la laboristoj timis nek laciĝon, nek malfacilon. Ili havis rigoran sciencan sintecon. En esprimo per iliaj vortoj tio estas: "penemo plus saĝeco". Unuflanke ili modeste studis avangardan sperton en kaj ekster la lando, kaj aliflanke kuraĝe breĉis la limigon de malraciaj difinoj de la malnova projekto, konstruado kaj produktado. Antaŭe konstruado kaj muntado ne povis esti kruciĝe farataj, oni nur povis fari ilin unun post alia. En multaj konstruoj tiaj difinoj malhelpas la rapidecon. Nun la laboristoj samtempe faris tiujn laborojn, kiuj povis esti kruciĝe farataj.

En septembro de 1969, kiam ankoraŭ ne finiĝis la muntado de rafinaj ekipaĵoj, produktaj laboristoj kaj teknikistoj jam venis al la konstruejo. Post finmuntado de ĉiu ekipaĵo ili prove ekfunkciigis ĝin por koni ĝiajn karakteron, produktan proceson kaj manipuladojn, tiel ke la kvalita ekzameno kaj la vapora purigo al la ekipaĵoj povis esti antaŭtempe farataj.


En muntado de turo de atmosfera distilado, la temperaturo falis ĝis 16 gradoj sub la nulo.


Veldo en tia frosteco ofte kaŭzis kreviĝon de velditaĵo. Laŭ la kutima metodo, oni devas konstrui altan domon kaj varmigi ĝin, aŭ mendi tian ekipaĵon ĉe koncerna fabriko. Laboristoj diris: "Tiuj ĉi metodoj multe elspezigos kaj prokrastos la konstruadon, ili ne konformas al la spirito de la ĝenerala linio de socialisma konstruado. Ni devas munti ĝin laŭ la ekzistantaj kondiĉoj." Ili faris tri fornojn el oleaj bareloj kaj metis ilin en la turon por ĝin varmigi. Ekster la turo ili starigis matan muron por ĝin ŝirmi kontraŭ vento. Per tiu ĉi metodo ili sukcesis veldi la turon en malalta temperaturo. En tri monatoj ili plenumis la taskon, por kio oni antaŭe devis uzi almenaŭ 7 monatojn.

En la muntado laboristoj aplikis la metodojn de struktura antaŭfabrikado, de ensembla starigo de ekipaĵo, de ĉeloka muntado kaj de tridimensia kruciĝa laborado, kiuj multe rapidigis la konstruadon.

Ĝis septembro de 1969, nome en ĉirkaŭ unu jaro oni konstruis tri kompletojn de petrolrafinaj ekipaĵoj kaj ekipaĵojn de ok helpaj sistemoj de akvo, elektro kaj vaporo. Krome ankaŭ la du grandaj fervojaj stacioj por transporto de oleoj estis konstruitaj. Kaj ĉiuj ili sukcesis en la unuafoja prova funkciigado. Kiam klara petrolo glate elfluis, oni ekhurais pro emociiĝo.

Centrala kontrola ĉambro de rafina ekipaĵo





Fenolo kaj aliaj produktaĵoj el vostgaso de la petrolrafinado.

En pli ol unu jaro post la ekprodukto, laboristoj konstruis grandan ekipaĵon de sinteza kaŭĉuko kaj 11 petrol-kemiajn ekipaĵojn. Krom tio, kun spirito de strebado al pli alta nivelo, ili ankoraŭ faris teknikan reformon al la antaŭaj tri kompletoj de rafinaj ekipaĵoj kun avangarda nivelo de la

sesdekaj jaroj, tial la prilabora povo de tiuj ekipaĵoj duobliĝis ol la projektita normo.


MALPURA AKVO EN PETROLRAFINADO ESTAS PURIGITA KAJ REFOJE UZATA

En kompare malalta loko en la valo estas traktejo de malpura akvo uzita en petrolrafinado. La vizitantoj ĉiuj havas apartan intereson por rigardi ĝin.

Veninte tien, oni tuj estas absorbitaj de viva sceno: Neĝblankaj pekinaj anasoj naĝas libere kaj kvakas en la klara akvo; en baseno orfiŝoj senĝene naĝas tien kaj reen; proksime en kampo balanciĝas pezaj rizospikoj en vento. Se oni ne vidus la lignajn tabuletojn kun jenaj surskriboj "Anasoj bredataj en purigita malpura akvo", "Rizkampo irigaciata per purigita malpura akvo" kaj "Fiŝoj bredataj en purigita malpura akvo", oni ne povus kredi, ke la akvo estas traktita malpura akvo, kiu entenis oleon kaj tokson antaŭ la traktado.

Kiel oni purigas la malpuran akvon? Unue, ni sciu la konsiston de la malpura akvo.

La petrolrafina fabriko ĉiutage ellasas multe da malpura akvo, kiu entenas oleon, fenolon, sulfidon k.a. malutilajn substancojn. La oleo povas detrui grundon; fenolo kaj sulfido povas veneni



animalojn kaj vegetalojn. Se homo aŭ besto trinkas akvon entenan tro multan fenolon, tiu toksigo kaj eĉ mortos.

Tamen malpura akvo en petrolrafinado entenas nitrogenon, fosforon k.a. utilajn substancojn, kiuj povas grasigi grundon. La akvo entenas ankaŭ malmultan stimulaĵon naftena acido, kiu povas akceli kreskadon de vegetaloj.


Antaŭ konstruo de la fabriko, gvidantaj kadroj, laboristoj kaj sciencaj esplorantoj jam konsideris, ke ĉiuj aferoj de nia socialisma lando devas konformi al la intereso de la popolo, kaj la fabriko ne devas komenci produkton antaŭ ol la malpura akvo estas bone traktita. Krom tio oni ankaŭ devas forigi malutilajn substancojn en la akvo kaj uzi la utilajn por irigacii sekajn kampojn de la montaro. Ili starigis specialan grupon por traktado de malpura akvo. Vaste kolektinte opiniojn de komunumanoj en la ĉirkaŭaĵo, la grupanoj faris detalan diskuton kaj projekton pri traktado de malpura akvo. Por konstrui la traktejon de malpura akvo, la ŝtato elpezis pli ol 2 milionojn da juanoj.

La purigado de malpura akvo havas longan proceson. La akvo unue fluas en sensulfurigajn turojn por forigi sulfidon, poste en senoleigajn basenojn por forigi oleon, poste la akvo fluas en flotigajn basenojn por forigi aliajn substancojn en la akvo, fine mikroboj forigas restajn fenolon kaj sulfidojn kaj tiam la akvo fariĝis klara.

En pli ol 3 monatoj, laboristoj kaj esplorantoj faris centojn da eksperimentoj pri ĉiu procedero de traktado de malpura akvo kaj akiris sukceson. Ekde la pasinta printempo, kampoj de 10 brigadoj de tri komunumoj estas prove irigaciaj per purigita akvo. La rezulto montris ke certa pliprodukto de maizo, fabo, arakido, tritiko kaj rizo estis akirita.


En la distrikto de la Feniksa Monto cirkulas legendo, ke antaŭ multaj multaj jaroj fenikso venis al la monto kaj ĉiuj birdoj alflugis por ĝin omaĝi. En legendo de nia lando, fenikso estas birdo de feliĉo. Oni revis pri ŝanĝo de montvalo malriĉa en riĉan. Kaj nun en la socialisma nova Ĉinio, la Feniksa Monto akiris novan fizionomion. La konstruata Pekina Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko flugas kiel ora fenikso.

Anasoj naĝas en la baseno plena de purigita akvo el la aerumaj basenoj de la traktejo de malpura akvo.




Turni Forĵetaĵojn en Utilaĵojn


Ŝanhajo akiris unuajn sukcesojn en sinteza utiligado de senutilaj likvo, gaso kaj skorio de industrioj kaj loĝantara malpura akvo kaj reformado de Suĝou-rivero, kiu fluas tra la urbo. El tiuj senutilaĵoj oni ekstraktis multajn valorajn materialojn, el kiuj centoj da specoj de novaj kemiaĵoj estas faritaj; kaj la serioze poluciata Suĝou-rivero antaŭ la Liberigo puriĝas iom post iom. Tio akcelis la disvolviĝon de industria kaj agrikultura produkto, plibonigis la higienan fizionomion de la urbo, garantiis la sanon de la popolo kaj manifestis la superecon de la socialisma sistemo de nia lando.





Jen ŝanhajaj esploristoj de manĝaĵoj ekzamenas fiŝojn el Suĝou-rivero por koni ilian staton kaj la akvokonsiston.



Laborantoj de la Sanhaja Prolakika Stacio ekzamenas la akvon de la kunigo de la riveroj Huangpu kaj Sugou por trovi ĉiam pli-bonan rimedon por garanti la purecon de la riverakvo.



Por forigi la malbonan influon de hidrarga vaporo al laboristoj kaj ĉirkaŭaj loĝantoj, la Fabriko de Medicinaj Mezuraparatoj de Sanhajo disvolvis la saĝon de la amasoj kaj kreis aeruman purigilon de hidrarga vaporo.








La Ŝanhaja kemia fabriko Liaūjuan efektivegis fumtuban senpolvigon kaj la efikeco superis 90%. Ĉiujare el la fumo oni povas akiri centojn da tunoj da pura alkalo. Jen laboristoj de aliaj fabrikoj de Ŝanhajo lernas ĝian sperton.

Laboristoj de la Ŝanhaja Tria Fera-Ŝtala Fabriko aktive utiligas ŝtalan skorion kaj akiris el ĝi multajn valorajn metalojn.

La Ŝanhaja Dua Medikamenta Fabriko konstruis purigan cisternon, kiu ĉiutage povas purigi 18,000 tunojn da malpura akvo por refoja uzo.



污水灌溉



Ŝanhajo konstruis ĉe la haveno Ĵihuj kondukejon de malpura akvo por irigacii kampojn, tiel ke malpura akvo de industrioj kaj loĝantoj povas flui tra la kloako sub Huangpu-rivero en kampojn.

Post purigo, per la malpura akvo de Ŝanhajo oni povas irigacii pli ol 4.000 hektarojn da kampoj, kio ebligas abundan rikolton per malmulta elspezo. Jen laborantoj de la Ŝanhaja Agronomia Akademio enketas pri kreskado de legomoj irigaciataj per malpura akvo.

Post Lernado en Kadrolernejo de la Sepa de Majo

EN bela montregiono en la sudokcidenta Siĉuan-provinco de nia lando troviĝas Vankiu-a Kadrolernejo de la Sepa de Majo. Dum la pasintaj tri jaroj, pli ol 4,000 kadroj tie lernis, sin hardis kaj estis senditaj al laborpostenoj. Iuj el ili revenis tien, kie ili laboris antaŭe, aliaj estis senditaj al novaj laborpostenoj.

La lernejo estas fondita de la revolucia komitato de Siĉuan-provinco en la komenco de 1969, laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ pri partopreno de kadroj en fizika laboro kaj relerno. Ĝiaj lernantoj estas kadroj venintaj de provincolnivelaj institucioj de Siĉuan, inter kiuj sin trovas maljunaj kadroj spertintaj longdaŭrajn revoluciajn batalojn kaj ankaŭ junaj kadroj. Ili lernas unuflanke kaj partoprenas fizikan laboron aliflanke. Ĉiuj studas verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ en ligo kun sia revolucia praktiko kaj kritikas la kontraŭrevolucionan reviziisman linion antaŭenpuŝitan de Liu Ŝaŭki kaj similaj pseŭdomarksismaj politikaj trompistoj por altigi sian kapablon distingi veran Marksismo-Leninismon de pseŭda Marksismo-Leninismo kaj konscion pri praktikado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Post certa tempo, ili iras al apudaj popolaj komunumoj por labori, studi kaj vivi kune kun komunumanoj por akcepti reedukon de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj elkulturi laborstilon strikte interligi kun amasoj kaj peneme luktadi en malfaciloj.

La kadroj revenintaj al la laborpostenoj ĉiuj laboras vivplene kun nova laborstilo.

La nuna vicestro de la revolucia gvidanta grupo de la Higiena Buroo de Siĉuan-provinco Pan Jangtaj estas unu ekzemplo. Antaŭ la granda kultura revolucio, Pan Jangtaj laboris kiel gvidanto en

la provinca higiena institucio. Tiam li komprenis la revolucionan higienan linion de Prezidanto Maŭ ne tiel profunde, ke li praktikis la kontraŭrevolucionan reviziisman kuracajn kaj higienajn linion de Liu Ŝaŭki kaj ne observis la instrukcion de Prezidanto Maŭ meti la gravitan punkton de la

Pan Jangtaj (la maldekstra) kaj medicinaj laborantoj kune studas pri laboro.



kuraca kaj higiena laboro en la kamparon, tial higienaj kaj kuracaj institucioj servis nur al malmultaj urbanoj, sed ne al la vastaj laborantaj amasoj.

Pan Jangtaj bredis bovojn por bienulo jam en infanaĝo kaj estis kruele ekspluatata kaj poste sub la gvido de Prezidanto Maŭ li revoluciis dekojn da jaroj. Kial tia maljuna kadro deviis de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ? Li trovis la gravan kialon, ke li longtempe loĝis en urbego kaj apartiĝis de laborantaj amasoj, sekve lia amo al ili iom post iom malfortiĝis. La lerno, sinhardado, fizika laboro kaj vivado de pli ol unu jaro kun malriĉkampanoj kaj malsupera mezkampanoj levis lian klasan amon al la laboranta popolo. Li denove studis la instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri la kuraca kaj higiena laboro, en ligo kun la reala higiena afero de la kamparo kaj akiris pli profundan konon.

Post kiam li refoje eklaboris kiel gvidanto, li metas praktikadon de la kuraca kaj higiena linio

Ĝaŭ Bajŝun rikoltas sukerkanojn kune kun komunumanoj.



de Prezidanto Maŭ en la unuan lokon. Foje, iu malriĉkamparana komunumano kritikis per daziĉbaŭo iun hospitalon de Ĉengtu pro tio ke unu el ĝiaj laborantoj faris eraron en kuracado al iu malsanulo pro neglektemo. La daziĉbaŭo tuj vekis atenton de Pan Jangtaj. Li faris profundan enketon kaj konstatis ke la kritiko de la komunumano estas ĝusta. Por ke ĉiuj kuracaj laborantoj de la tuta provinco ĉerpu lecionon el la eraro, li aktive gvidis ilin en studo pri tutkora kaj tutanima servo al la popolo. Tio altigis ilian konscion kaj pluapaŝe plibonigis ilian kuracan laborstilon kaj sintenon en servo al la popolo.

Kin Hjuhian, titolita de amasoj kiel “bona administranto” estas maljuna kadro plena de revolucia viveco post sinhardo en tiu kadrolernejo de la sepa de majo. Li estis vicestro de la Ĝenerala Direktejo de la Agrikultura Buroo de Siĉuan. Li estas kadro hardita en revoluciaj militoj. En 1932 li aliĝis al la revoluciista vicaro kaj spertis la 25,000-lian Longan Marŝon sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Post la Liberiĝo de la tuta lando, li iris en urbon. De tiam pli kaj pli malmultiĝis por li ŝancoj por partopreni fizikan laboron kaj interrilatiĝi kun popolamasoj, rezulte de tio lia revolucia volo fariĝis malpli forta ol antaŭe.

La streĉa vivo de lernado kaj fizika laboro en la lernejo rememorigis al Kin Hjuhian pri la pasinta vivo en la revolucia bazloko de Jan-an. Tiam li kaj liaj kamaradoj portis pioĉon en unu mano kaj fusilon en la alia, manĝis miliaĵon kaj ĉiam pensis pri la libera afero de la laboranta popolo. Komparante tion kun sia posta vivo li pluapaŝe komprenis la profundan signifon de la instruo de Prezidanto Maŭ: **“Partoprenante kolektivitan produktan laboron, kadroj tenas plej vastan, konstantan kaj intiman ligan kun la laboranta popolo. Tio estas granda afero de fundamenta graveco por socialisma sistemo; ĝi helpas venki burokratismom kaj preventi reviziismon kaj dogmismon.”**

Nun Kin Hjuhian estas gvidanto de iu provizejo de konstruaj materialoj de Siĉuan, sed li atente

konservas la stilon de penema luktado en malfaciloj kaj strikte interligiĝas kun amasoj, ĉiam bone memorante la signifoplenan vivon en la kadrolernejo. Por ŝpari karbon, li reformis malnovan fornon en karboŝparan fornon kune kun aliaj laborantoj. Li ankaŭ ofte helpas laboristojn purigi, ripari meblojn kaj fari aliajn aferojn. Ĉiuj laŭdis: “El la konduto de maljuna Kin, ni vidis la revolucionan spiriton de ruĝa armeano.”

La juna teknikistino Jang Gingjing revenis en la Ŝpinteksan Grupon de la Malpeza Industria Buroo post lernado en la kadrolernejo. Ŝia spirita fizionomio multe ŝanĝiĝis kompare kun la antaŭa. Ŝi kreskis kaj lernis en urbego. Diplomiĝinte ŝi laboris kiel teknikistino. Ŝi vere estas t. n. “triporda kadro” kiu iris el la hejma pordo en la lernejan pordon kaj poste el la lerneja pordo en la oficejan pordon. Pro tio, ke ŝi malmulte partoprenis la batalan vivon de amasoj kaj produktan laboron, al ŝi mankis profunda klasfrateco al la laboranta popolo. Antaŭe ŝi opiniis sin pli saĝa ol la laboranta popolo kaj ambiciis fariĝi kaj fariĝi specialisto. En la kadrolernejo de la sepa de majo ŝi partoprenis kulturadon de fojno kaj bredadon de porkoj. En la komenco ŝi ne povis fari eĉ simplajn agrikulturajn laborojn. Poste malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj kaj kamaradoj ellernigis ŝin. Tio multe kortuŝis tiun ĉi intelektulinon. Ĝuste en la procezo de akceptado de reeduko, pli kaj pli fondiĝis ŝia amo al la laboranta popolo. Ŝi diris: “La laboranta popolo elkulturis min, mi devas tutkore kaj tutanime servi al ĝi.” Korektinte sian malnovan kutimon ŝvebi en la supera institucio kaj ne fondiĝi en fundamentajn unuojn, ŝi ĝoje iras al fabriko kaj modeste lernas de laboristoj. Lastatempe, kune kun laboristoj kaj teknikistoj de iu ŝpinteksa fabriko ŝi resumis sperton de teknika renovigo, kio utilis al akcelo de la produktado kaj estis bonvenigata de laboristoj.

La vivo de la kadrolernejo estas streĉa kaj gaja.



Jang Gingjing (la dekstra) lernas ĉe laboristino teknikon.

Ŝvitoj dum la fizika laboro forlavis la burokratismon kreskantan en iuj homoj, kiuj iom post iom apartiĝas de amasoj, kaj altigis ilian konscion pri daŭra revoluciado. Firme tenante la instruon de Prezidanto Maŭ “**Ni komunistoj ne celas fariĝi estroj, sed fari revolucion**” kiel kompason de sia agado, ĉiuj, kiuj estos sendataj al nova laborposteno, meminiciate postulis iri al plej malfacilaj lokoj.

Ĝaŭ Bajŝun, la nuna estro de la revolucia komitato de nacimalplimulta regiono de Siĉuan, estis vicfakestro de la Agrikultura Buroo de Siĉuan. Antaŭ du jaroj, kiam li estis forironta de la kadrolernejo, li postulis veni tien. La duan tagon post sia atingo al la laborposteno, Ĝaŭ Bajŝun, kunportante pakajon surdorse, fondiĝis en la plej malproksiman kaj plej postigintan produktan grupon. Li studis kaj laboris kune kun la komunumanoj kaj petis de ili bonajn proponojn por teni revolucion kaj stimuli produkton, kaj mobilizis la kadrojn kaj komunumanojn ke ili peneme strebu al prosperiĝo sinapogante sur la propraj fortoj por ŝanĝi la fizionomion de postiginteco. Post penado de pli ol unu jaro, la produkta grupo rimarkinde ŝanĝiĝis: en la pasinteco ĝi bezonis grenprovizon de la ŝtato, sed nun jam fundamente efektivigis memprovizon de greno.

Naĝa Sporto de Daŭgiaŭ-komunumo

EN Dongguan-gubernio ĉe la delto de la Perlo-rivero de Guangdong-provinco estas multaj riveroj kaj lagoj, apud kiuj troviĝas 50% da kampoj kaj vilaĝoj de tiu gubernio. Boato estas necesa por la komunumanoj por iri al kampo aŭ foiro. Ankaŭ naĝado estas populara en la gubernio, precipe en Daŭgiaŭ-komunumo.

Lastajare, tieaj komunumanoj faris naĝan prezentadon sur rivero aparte por la vizitantoj venintaj de diversaj lokoj de Guangdong-provinco. La prezentadon partoprenis junaj kamparanoj, laboristoj de komunumaj fabrikoj, lernantoj, infanoj de infanĝardenoj kaj maljunuloj pli-ol-60-jaraj. La programo inkluzivis papilian, brustan, dorsan kaj rampan naĝadon, transnaĝon de rivero kun ŝarĝo faritan de milicanoj kaj surakvan urĝasavon faritan de kuracistoj kaj flegistinoj de la komunuma hospitalo.

Ekde 1958, kiam en la komunumo disvolviĝis amasa naĝa aktivado, ĝis nun ellernis naĝadon

jam pli ol 33,000 homoj, kiuj estas 70% de la tuta loĝantaro de la komunumo. Eĉ en vintro oni povas vidi multajn naĝantojn en riveroj kaj naĝejoj. Des pli vigla sceno troviĝas en amikecaj naĝkonkursoj inter produktaj brigadoj okazintaj je festoj kaj ripoztagoj.

Kial la komunumanoj tiel ŝatas naĝi? Jen ilia respondo: "Por efektivigi la alvokon de Prezidanto Maŭ '**Disvolu sportajn aktivadojn kaj plifortigu la fizikan kvaliton de la popolo**', ni devas bone utiligi niajn riverojn kiel naturajn naĝejojn."

Samtempe ili povas diri al vi multajn rakontojn:

Foje, kiam pli ol 30 komunumanoj laboris en insuleto, subite ŝvelanta akvo sieĝis ilin kaj forportis ilian boaton. La torento estis tuj englutonta la insuleton kaj forportonta ankaŭ ilin mem. En tiu alarma momento, kelkaj junuloj kun bona



*Iu natura naĝbaseno de
Daŭgiaŭ-komunumo*

Trejnistoj de la Amatora Sporta Lernejo de Daŭgiaŭ instruas al geknaboj brustan naĝon.



naĝarto brave saltis en la furiozan fluon, retiris la boaton, dank' al kiu la komunumanoj, bubaloj kaj terkulturiloj estis transportitaj al sekura loko.

En unu vintra tago, boato plensarĝita de rizo estis dronigita de vento kaj 3,500 kg. da rizo ankaŭ falis en riveron. Dekkelkaj junuloj tuj subakvigis spite al ondego kaj frosto kaj post pli ol 3 horoj ili elakvigis la rizon el la riverfundo profunda je pli ol 3 metroj.

La gemilicanoj de Daŭgiaŭ diris: "Ĉi tie estas mardefenda fronto. Ni devas bone hardi nian korpon por esti ĉiam pretaj bati la agresantojn kaj defendi nian belan patrolandon." Ili ĉiam tenis en sia memoro jenan historion: Dum la Opia Milito kondukita de la brita imperiismo antaŭ pli ol cent jaroj, la militŝipoj de la agresantoj invadis en nian landon ĝuste tra Humen de Dongguan-gubernio. La mararmeanoj de Dongguan transnaĝis la maron en profunda nokto kaj sekrete proksimiĝis sub malamikajn ŝipojn. Ili difektis la ŝipfondon per hakilo kaj forte punis la malamikojn. La heroa batalo de tiamaj Dongguan-anoj nun kuraĝigas la milicianojn.

La amasa naĝa aktivado de Daŭgiaŭ iris ne ĉiam glate. Sed la malfaciloj ne timigis la komunumanojn.

Antaŭ la Liberiĝo, pro la longtempa katenado de la feŭda moralo, la virinoj ne kuraĝis naĝi en

bankostumo. Post la Liberiĝo, kamparaninoj partoprenantaj naĝadon ankoraŭ estis mokataj de iuj, ĉar la influo de la malnova moro ankoraŭ restis, kvankam ĝi estis multe kritikita. Sub tiaj cirkonstancoj, junulinoj, precipe kadrinoj konscias, ke naĝado signifas ankaŭ batalon kontraŭ malnova moro. Ili kuraĝe partoprenis en naĝado rompante la obstaklojn.

Fang Giuhe, laboristino de la Daŭgiaŭ-a Pajloplektaĵa Fabriko, estas unu el tiaj junulinoj. En la komenco oni asertis ke ŝi neniel povas ellerni naĝadon, eĉ se ŝi ellernus, tio portus al ŝi nenan utilon. Ŝi faris decidon en sia koro ke ŝi nepre akiros sukceson. Ŝi ekzercis sin en akvo apogante la brakojn sur tabulo kaj baldaŭ laciĝis. Sed ŝi obstine lernis naĝi ĉiutage post sia laboro, kelkfoje eĉ ne preterlasante dimanĉon. Tagon post tago ŝi jam forlasis sian tabulan apogilon kaj nun ŝi povas transnaĝi riveron larĝan je kelkdek metroj. Ŝia korpo pli kaj pli fortiĝis kaj la laborefiko altiĝis. Antaŭe ŝi funkciigis 2 maŝinojn en deĵoro sed nun 4.

Daŭgiaŭ-komunumo zorgis ankaŭ pri altigo de sporta nivelo surbaze de disvastigo de amasa naĝa sporto. Por kulturi junajn sportistojn kaj trejnistojn ĝi organizis pli ol 20 naĝajn teamojn kaj ankaŭ kurson por amatoraj naĝaj aktivuloj. De la komunumo devenis elstaraj ŝtataj naĝistoj, kiaj Je Huanĵong kaj Liang Gujliang.



Scienca Eksperimento de Poma Produkto

LU ŜAŬMIN

NIA brigado estas unu el la ĉefaj produktaj lokoj de la Jantaj-a poma kaj havas pli ol 120-jaran historion de kulturado de pomarboj. En la pasinteco, la produktokvanto de tieaj pomoj estis malalta kaj nestabila, kaj ekzistis fenomeno, ke en iuj jaroj produktiĝis multaj fruktoj kaj en aliaj jaroj malpli multaj kaj tiun fenomenon oni nomas “abunda jaro kaj malabunda jaro”. Dum la lastaj jaroj, sub la direktado de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ Zedong, ni kondukis sciencon eksperimenton de poma produkto, paŝon post paŝo trovis regulojn de pliprodukto, neniigis la fenomenon de malabunda jaro kaj garantiis altan kaj stabilan produkton de pomoj.

Ĉu oni povas neniigi la fenomenon de malabunda jaro aŭ ne? Kiamaniere? Iuj diris, ke la fenomeno de malabunda jaro ekzistis de longe kaj ne povas esti ŝanĝita. Aliaj diris, ke oni povas ŝanĝi ĝin, se oni bone administras akvon, sterkon kaj teron kaj preventas malsanon kaj fiinsektojn. Triaj diris, ke racia pritondo de pomarbo estas ŝlosilo por neniigo de la malabunda jaro. Kiu el tiuj opinioj estas ĝusta? Ni opinias, ke la problemo povas esti solvita ne en ĉambro, sed en praktiko. Tial ni iris en pomĝardenojn kaj zorge observis pomarbojn. En la observado ni trovis, ke el la meza kaj posta partoj de kelkaj branĉetoj de unu arbo, kies pintojn ni fortendis, en la antaŭa jaro dum eliminado de pulvora ŝimo, elkreskas novaj branĉetoj kaj floroj, tiel ke plimultiĝis punktoj de fruktado, sed la netonditaj branĉetoj ankoraŭ

longiĝas sen plimultiĝo de tio. Ni faris komparon kaj analizon pri la du fenomenoj kaj konkludis ke fortondo de branĉetpinto multigas nutraĵon en ĝia posta parto kaj elkreskigas sufiĉe multe da novaj branĉetoj kaj florburchonoj garantiante pliprodukton en la kuranta jaro kaj metante fundamenton de altprodukto en la venonta jaro. Dank’ al tia pritondo, unu frukta branĉeto iom post iom fariĝas grupo de fruktaj branĉetoj, kiuj laŭvice kaj ĉiujare fruktas. Netondo de branĉetpinto ne povis florigi la branĉojn en bona proporcio kaj pro tio la branĉoj fruktis nur en ĉiu dua jaro, sekve aperis la fenomeno de malabunda jaro. La komparo kaj analizo vidigis al ni, ke la opinio pri racia pritondo estas ĝusta. Surbaze de racia administrado de akvo, sterko kaj tero, ni povas per racia pritondo elimini la fenomenon de malabunda jaro en poma produkto.

Ĉu ni povas ĝenerale apliki tiun pritondmanieron, kiu estigis bonan rezulton nur al iuj arboj? Ni decidis pliapaŝe fari eksperimenton. Tiam iuj diris: “Fortondo de branĉetpinto malaperigis pomojn. Ni neniam vidis tian pritondon.” Ni pensis, ke se oni ne kuraĝus fari kion oni ne vidis, do produkto ne povus disvolviĝi, kaj revolucio ne povus progresi. Por fari revolucion oni devas havi kuraĝon por praktiki kaj forĵeti malnovajn kutimojn. Ni do sentime faris eksperimenton de fortondo de branĉetpinto en dekmua fruktoĝardeno kaj samtempe racian administradon de akvo, sterko kaj tero, kaj ricevis riĉan rikolton

de pomo en sinsekvaj jaroj. Ni nomas tiun metodon "fortondo de branĉetpinto".

La eksperimento sukcesis, sed ankoraŭ ekzistis multaj kontraŭdiroj, kiuj devis esti solvitaj. Kvankam fortondo de branĉetpinto stimulis arbojn multe frukti, tamen post ĉiu aŭtuno ĉe la fino de la branĉetoj, kies pinto estis fortondita, elkreskis novaj fortaj branĉetoj, kiuj ne fruktis, sed vane konsumis nutraĵon kaj malhelpis aerumon kaj sunumon de la arboj. Kiel solvi la novan kontraŭdiron? Ni refoje faris eksperimenton, fortondis fortajn branĉetojn kaj pintojn de branĉetoj restigitaj por frukti. Dank' al tio, solviĝis la kontraŭdiro kaj la tekniko de "fortondo de branĉetpinto" ricevis novan progreson.


En praktikado ni ankoraŭ rimarkis, ke la punktoj de fruktado estas en eksteraĵo de la arboj, sed en la interna parto ne troviĝis fruktodonaj branĉetoj. La fenomeno de malabunda jaro malaperis,

tamen pro tio ke fruktodonaj punktoj ne plimultiĝis, ne povis efektiviĝi pliprodukto. Por pliigi fruktajn branĉetojn en la interna parto, per la metodo de fortondo de branĉetpinto ni forigis antaŭajn partojn de iuj branĉoj por elkulturi novajn branĉetojn en la interna parto, kaj samtempe ni lasis la ĉirkaŭajn branĉetojn daŭre disvolviĝi. Dank' al tio, fruktodonaj punktoj pliigis en la interno, arbokrono iom post iom grandiĝis, kaj fortiĝis ĝia fotosintezo, kio ebligis fabriki multan nutraĵon bezonatan por fruktado. La efiko de fortondo de branĉetpinto estis pli bone utiligita, kaj la poma produktokvanto rimarkinde pliigis.

Poste, en senĉesa praktikado ni trovis efikan metodon por plua altproduktado de maljunaj arboj travivintaj la periodon de multfrukteco. Nun la pomua produktokvanto de pomo altiĝis de pli ol 350 kilogramoj ĝis pli ol 1,500 kilogramoj.

Ni decidis senĉese praktiki kaj progresi por fari novan kontribuon al altprodukto de pomoj.

Rikoltitaj pomoj de la brigado Ŝaŭŭjukoŭ



Porcelanaĵoj de Gingdeĝen

GINGDEĜEN de Gianghi-provinco konata kiel “porcelana urbo” havas historion de pli ol mil jaroj en porcelana produkto. En la lastaj jaroj pliapaŝe disvolviĝis ĝia produkto.

Nun en Gingdeĝen sin trovas 19 grandaj porcelanaj fabrikoj kaj kelkaj tiaj fabrikoj funkciigataj de urbaj komunumoj. La porcelanaj laboristoj nun jam nombriĝas je pli ol 30,000. Kun pliboniĝo de la produktaj kondiĉoj, la fizionomio de multaj porcelanaj fabrikoj multe ŝanĝiĝis. La Gianguo-a Porcelana Fabriko estas malnova fabriko kun historio de kelkcent jaroj. Antaŭe eĉ en ĝia plej prospera periodo laboristoj devis labori per simplaj ekipaĵoj en malaltaj domoj konstruitaj el adoboj kaj ĝia produktokvanto estis tre malgranda. Post la Liberiĝo, ĝi fariĝis la unua ŝtata porcelana fabriko de la urbo. Grandaj kaj vastaj domoj anstataŭis la antaŭajn kadukajn metiejojn kaj la produktonivelo senĉese leviĝis.

La porcelana produkto de Gingdeĝen jam tute liberiĝis de la diseca privata administrado. La pli ol 20 porcelanaj fabrikoj de la urbo estas racie dislokitaj kaj dividitaj en laboro kaj iliaj produktaj ĵoj havas siajn apartajn karakterizaĵojn. Iuj fabrikoj speciale produktas tradiciajn produktaĵojn kiel porcelanaĵojn kun blua desegno, diafanaj punktoj aŭ koloraj glazuroj; aliaj porcelanaĵojn uzatajn en ĉiutaga vivo kiel kaŝtrinkilarojn, tetrinkilarojn, manĝilarojn, bovlojn, telerojn, tasojn, kruĉojn kaj vazojn; kaj ankoraŭ iuj fabrikoj produktas porcelanajn metiartaĵojn kiel porcelanajn skulptaĵojn, florajn vazojn kaj porcelanajn platojn kun pentraĵoj. En la lastaj jaroj oni ankoraŭ starigis fabrikojn produktantajn porcelanaĵojn uzatajn en elektra industrio, konstruado, higieno, ŝpinteksado kaj specialajn porcelanaĵojn acid-, varm- kaj premrezistantajn. Dank’ al racia lokiĝo de la fabrikoj kaj specialeco en produkto la produktokvanto de porcelanaĵoj pli kaj pli multiĝis kaj ilia kvalito senĉese pliboniĝis.

La porcelana arto de Gingdeĝen havas longan tradicion. Laŭ la principo de Prezidanto Maŭ “**utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo**” kaj “**disvolvi novon el malnovo**”, la vastaj amasoj de porcelanaj laboristoj kaj artaj laborantoj heredis la eliton de la tradicia arto kaj forigis ĝian feĉon. Ili profundiĝis inter amasojn por lerni kaj kreis novaĵojn en formo, desegnado, glazuro kaj skulptado.

Disvolvante kolektivajn saĝon, veteranaj laboristoj, teknikistoj kaj porcelanaj belartaj laborantoj de la Vejmin-a Porcelana Fabriko produktanta porcelanaĵojn por eksporto kreis pli ol 80 novajn formojn kaj pli ol 120 novajn desegnojn en la pasinta jaro. Antaŭ la Liberiĝo tre malmultaj

Porcelanaĵoj de Gingdeĝen



estis la specoj de la tetasoj tie produktitaj, tamen en la lastaj jaroj la nombro de ili atingis kelkdek. La projektita de ili tetaso kun tre plaĉa ekstera konturo, rektaj linioj kaj ronda interna fundo estas kaj bela kaj facile lavebla.

Ankaŭ la strukturo kaj koloroj de la pentraĵoj sur la porcelanaĵoj havas grandan disvolviĝon. Belartaj laborantoj kaj porcelanaj laboristoj de Gingdeĝen ofte vizitis aliajn lokojn por lerni, ĉerpis superecaĵojn de novjaraj, oleaj kaj akvarelaĵoj pentraĵoj kaj riĉigis per ili la ornaman arton de bildoj sur porcelanaĵoj, tiel ke la bildo akordiĝis kun la formo de porcelanaĵo. Kaj la koloroj multiĝis de 7-8 ĝis ĉirkaŭ 100 specoj. La bildoj kaj formoj de porcelanaĵoj de la tuta urbo nove kreitaj en la pasinta jaro atingis pli ol 3,000 specojn.

Koloraj glazuroj devas esti uzataj por beligi diversajn porcelanajn vazojn kaj tetrinkilarojn. En la malnova socio, pro detruo de la reakcilaro, la receptoj de multaj valoraj glazuroj estis perditaj. Post la Liberiĝo, dank' al prizorgo de la Partio kaj registaro tiuj koloraj glazuroj tre rapide reviviĝis. Laboristoj kreis 53 novajn specojn de koloraj glazuroj. Nun la koloraj glazuroj nombras ĉirkaŭ cent specojn. Antaŭe la glazuroj estis faritaj el naturaj materialoj. Pro iliaj malsamaj konsistoj, oni ne povis teni ĝustan temperaturon dum bakado, tial la procento de la normaj produktaĵoj estis tre malalta. Nun kuraĝe eksperimentante, porcelanaj laboristoj elfaris materialojn de diversaj koloraj glazuroj kaj pretigis nombron da receptoj, kaj la temperaturo dum bakado de porcelanaĵoj estas reguligata per aparato, tiel ke ĉirkaŭ 90% kaj iam eĉ 100% de la bakitaj glazuraĵoj sukcesas. En la lastaj jaroj, laboristoj aplikis kolorajn glazurojn ankaŭ por ornamo porcelanaĵojn por ĉiutaga uzo, tiel ke valoraj koloraj glazuroj, kiujn povis ĝui nur malmultaj homoj de la reganta klaso, servas al la vastaj laborantaj amasoj.

Krom tradiciaj porcelanaj skulptaĵoj, la laboristoj de la Gingdeĝen-a Fabriko de Porcelanaj Skulptaĵoj ankoraŭ produktas variajn artaĵojn kun epoka spiro per tradicia tekniko, kiuj estas ŝatataj de la amasoj.

Dank' al senĉesa kreado, multiĝis la specoj de porcelanaĵoj de Gingdeĝen kaj altiĝis ilia kvalito. Ankaŭ pli kaj pli multiĝis la kvanto de eksportataj porcelanaĵoj. Nun porcelanaĵoj de Gingdeĝen vendiĝas en pli ol 60 landoj de la kvin kontinentoj kaj kontribuas por disvolvi amikecon inter nia popolo kaj la aliaj popoloj de la mondo.

Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon
de

Radio Pekino

Por Eŭropo

GMT	Vendredo k Sabato 20:00—20:30
Ondoj(m)	47 45 31 25

Por Japanio, Koreio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 19:00—19:30
Ondoj(m)	47 40

Por Sudorienta Azio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 20:30—21:00
Ondoj(m)	25 19

Korespondi Deziras

*S-ro Jean Guy Robin, 59 Bd H. Dunant, 49 Angers, Francio, 27-j. librotenisto, kun aziaj kaj afrikaj landoj pri ĉt. kaj interŝ. bk., pm.

*Georgeto Luscolov, str. Miron Costin 18, Sector 8, Bucuresti, Rumanio, kun diverslandaj esp-istoj.

*S-ro Andrew Marshall, 193, East Common Lane, Scunthorpe, Lincolnshire, DN 16 1HL, Anglio, kun ĉinaj kaj japanaj esp-istoj-muzikistoj.

*Ruzicka Vaclav, Decin VI, Krasnostudenecka 731-69, Ĉeĥoslovakio, kun ĉinaj esp-istoj kaj interŝ. uzitajn kaj neuzitajn ĉinajn pm.

*Asztalos Lajos, str. Cotita 2, Cluj, Rumanio, pri literaturo kaj geografio kaj kolektas materialon tiurilate.

*Bye Nawsad Aliraja, Pellegrin Street, Sebastopol, Mauritius (Indian Ocean), kun amikoj de ĉl.

*F-ino Zoica Nicoara, 27-j., oficistino kaj Tit Cornel, 24-j., poŝtestro, comuna Virfurile, judet Arad, Rumanio, dez. interŝ. kolorajn bk. kun esp-istoj tm.



Vizito al la “Lando de Lagoj”

Tiu ĉi artikolo estas verkita de la Ĉina Ĵurnalista Delegacio, kiu vizitis sinsekve Finnlandon, Svedion Norvegon, Danlandon, Svision kaj Aŭstrion en januaro kaj februaro de 1972 laŭ invito de iliaj registaroj.

— La redakcio

FINNLANDO, famkonata en la mondo kiel la “Lando de Lagoj”, estas la unua lando kiun vizitis la Ĉina Ĵurnalista Delegacio.

Tagmeze de la 13-a de januaro kiam nia aviadilo venis super Finnlandon, ni vidis tra maldensa nubvualo vintran pejzaĝon de la norda Eŭropo. Sur la insuloj kovrataj de neĝo kaj glacio troviĝas multaj arbaroj nigre verdaj. La arbaroj kovras 71 procentojn da areo de Finnlando kaj donis gravan garantion por ĝia ekonomia disvolvo, tial oni nomas ilin “verda oro” de Finnlando.

Ni surteriĝis en aerodromo de Helsinki, la ĉefurbo de Finnlando kaj ricevis varman bonvenigon de la estro de Gazetara Buroo de la Finna Ministerio de Eksteraj Aferoj kaj aliaj finnaj amikoj. Ili diris al ni: “Hodiaŭ estas serena tago malofta en vintro de nia lando. Ni tre ĝojas pro tio ke nia lando la unua akceptas vian viziton.”

Ni ricevis varman gastigadon de la finna registaro. En la sekvinta tago post nia alveno, la finna ministro de eksteraj aferoj okazigis por ni bankendon en la Registara Akcepta Halo. La 18-an de januaro, Urho Kekkonen, prezidanto de la Finnlanda Respubliko, akceptis ĉiujn membrojn de nia delegacio. Li ĝoje parolis pri la historio de amikeco inter Ĉinio kaj Finnlando. Li diris: “Frue en la komenca periodo de la kvindekaj jaroj de tiu ĉi jarcento jam stariĝis diplomacia kaj komerca rilatoj inter Finnlando kaj Ĉinio. Finnlando ĉiam subtenas Ĉinion en restarigo de ĝia leĝa sidloko en UN kaj nun mi vidis kun kontento ke tio jam realiĝis.” Li diris ankaŭ ke la unua finna kultura delegacio vizitinta Ĉinion en 1953 estis gvidata de lia edzino. La vizito ŝin impresis profunde kaj ŝi parolis pri tio al li de tempo al tempo.

En Finnlando ni faris viziton al la Parlamenta Domego, la Nacia Muzeo, la nove konstruitaj Helsinki-a Teatro kaj Muzika Halo, televidaj stacioj, lernejoj, hospitaloj, bibliotekoj kaj fabrikoj. Ni havis vastan kontakton kun finnaj amikoj el gazetara, kultura kaj komerca rondoj, ricevis aŭtoblan gastigon kaj starigis novan amikecon kun ili.

Paperfaro kaj lignoprilaboro estas tradiciaj industrioj de Finnlando, kies produktaĵoj okupas 80% de ĝia eksporto antaŭ la Dua Mondmilito kaj nun okupas ĉirkaŭ 57%. Finnaj amikoj diris al ni ke tio ne signifas redukton de absoluta cifero de eksportaj papero kaj ligno, sed kreskon de eksportaĵoj de nova maŝina industrio.

Ni vizitis la Unuigitan Paperan Kompanion apud Tampere, la dua urbego de Finnlando. Ĝi havas fabrikojn tra la tuta lando kun jara produkto de 800,000 tunoj da papero kaj kartono, t.e. 15-20% de la landa produktokvanto. Ĝi produktas ankaŭ paperpaston kaj paperfabrikajn ekipaĵojn.

En Tampere ni vizitis ankaŭ maŝinfabron kie ni vidis drilojn fabrikatajn en la lastaj jaroj kaj famkonatajn paperfabrikajn maŝinojn. La laboristoj varme faris por ni manipuladon de driloj, eksplikante ĝiajn povon kaj karakteron. Inter ili troviĝas pneŭmata drileto, kiu estas eksportaĵo al nia lando. La finnaj amikoj diris ke tre grava estas la ĉina mendo kaj ĝi markas novan disvolvon de komerco inter la du landoj.

Ni ĝoje vidis ke Finnlando kaj Ĉinio havas bonan komercan interrilaton depost la subskribo de la komerca interkonsento en 1953. Ĝuste

kiel Prezidanto Kekkonen diris dum akceptado de la delegacio: “Ambaŭ flankoj estas kontentige plenumantaj la komercan interkonsenton.” Ankaŭ la ministro de eksteraj aferoj diris: “Finlando estas la unua ne-socialisma lando kiu havas komercan interkonsenton kun Ĉinio. Nia komerca interrilato bone disvolviĝas.” Li montris ke kun la disvolviĝo de amika rilato inter la du landoj estos ebleco pri kresko de komerco kaj varspecoj.

La amikeco de la finna popolo al la ĉina popolo donis al ni neforgeseblan impreson, kvankam nia lando estas tre malproksima de ĝi.

Ni venis al mezlernejo en Helsinko. La lernejestro diris al ni intime: “Ĉinio estas lando kun multnombra loĝantaro. Ĝi ne nur havas longan historion kaj kulturon, sed ankaŭ ludas ĉiam pli gravan rolon en la internaciaj aferoj. Por pli bone koni vian pasintecon kaj nuntempon, ni lernas vian lingvon entuziasme.” Montrante kelkajn lernantinojn starantajn apud ni li daŭrigis: “Ili lernas la ĉinan lingvon ekde la lasta aŭtuno kaj nun en la lernejo 20 gejunuloj lernas vian lingvon.” Ekpreninte lernolibron la lernantinoj esprimis sian amon al la ĉina lingvo per simplaj ĉinaj vortoj. Iu el ili diris al ni sincere: “Lerni vian lingvon estas por ni malfacile sed interese. Mi volas lerni ĝin diligente por akceli interkomprenon kaj amikecon inter la popoloj de Finnlando kaj Ĉinio.”

Finnaj amikoj afable invitis nin gastigi ĉe iliaj hejmoj. En la hejmo de la prezidanto de la Finna Ĉina Asocio, la gastiganto diris al ni emocie ke la finnaj popoloj aspiras koni Ĉinion kaj la membroj de la asocio duobligis en la lastaj monatoj. Iu kuracisto, kiu iam vizitis Ĉinion, invitis nin kaj siajn parencojn kaj amikojn interkonatiĝi en lia hejmo. Li ĝoje parolis pri sia vojaĝo en Ĉinio kaj sopiro al la ĉina popolo kaj projekciis por ni filmon faritan de li en Ĉinio. Ni vizitis ankaŭ hejmon de iu finna junulo. Kiam ni venis al li, lia negranda ĉambro estis jam plena de homoj, kiuj venis de diversaj partoj de Helsinko kaj inter kiuj iuj deziras viziti Ĉinion kaj aliaj jam tion faris. Iu veterana laboristo de kablofabriko, kiu vojaĝis al Ĉinio lastajare, diris ke li ĉiam volis vidi Ĉinion propraokule por kompreni kial la ĉinaj laboristoj estas tiel energiplenaj en laboro. Dum sia vizito li konis ke la kaŭzo kuŝas en tio ke ili konscias sian devon servi al la popolo tutkore kaj plenanime. Li diris ankaŭ ke viziti Ĉinion estis lia deziro de multaj jaroj. Por efektiviĝi ĝin li ŝparis monon el sia salajro monaton post monato kaj post kvar jaroj li fine realigis sian deziron. Ni forte emociiĝis pro lia rakonto, ĉar ĝi vivece esprimis la sinceran amikecon de la finna popolo al la ĉina popolo. Ni kredas ke kun multiĝo de la amika kontakto certe pliprofondiĝos la amikeco kaj interkompreno inter niaj du popoloj.



Gingŝeng

GINGŜENG estas la nomo de infano, kiu loĝas en Huaj-anĉeng-komunumo de Ĝanggiakoŭ, ĉirkaŭ 200 kilometroj for de Pekino. Kvankam Gingŝeng signifas en la ĉina lingvo “pekinan naskiton”, tamen efektive li ne naskiĝis tie.

Antaŭe li nomiĝis Ĝang Hjuebin. Li estas filo de iu komunu-

mano. En decembro de 1971, kiam li estis 14-monata, subite li sufokiĝis pro unu maizgrajno en lia trakeo. La urba hospitalo ne povis lin savi pro manko de iu necesa instrumento, kaj rekomendis al liaj gepatroj la Pekinan Gongnongbing-hospitalon.

La gepatroj rapidis kun sia filo al Ĝanggiakoŭ-stacio en nok-

to. Sed bedaŭrinde, la trajno veturanta al Pekino povis atingi la stacion nur post longa tempo. La infano estis en morta danĝero.

Rigardante la infanon, Liu Jujong, ĉefdeĵoranto de la stacio, brulis de maltrankvilo. “Ĉu atendi la trajnon? Tio ne taŭgas! Sed ne estas alia veturilo. Kion fari do?” Post pripenso li tuj



Gingŝeng kaj lia patrino

kuris al la komandĉambro de la fervojstacio por telefoni.

El la telefona megafono en la ĝenerala trajnoekspedejo de la pekina stacio eksonis urĝa alvoko: "Veturkomandanto, veturkomandanto! Ĉi tie parolas Liu Jufong de Ĝanggiakoŭ-stacio. En nia stacio, malsana infano de komunumano bezonas tuj veturi al Pekino por urĝa helpo..."

La partia filio de la trajnoekspedejo tuj kunvenis kaj decidis, ke la varvagonaro N-ro 069 kiu haltis ĉe la Suda Stacio de Ĝanggiakoŭ ekveturu antaŭtempe. La megafonoj sur la linio de Pekino ĝis Ĝanggiakoŭ tuj aŭdigis firman alvokon: "Ĉiuj stacioj atentu! Por savi iun infanon ni decidis ke la varvagonaro N-ro 069 tuj ekiru kaj estu traktata kiel grava vagonaro."

Tion aŭdinte, Liu Jufong tuj helpis la gepatrojn envagoniĝi.

La gepatroj diris emocie: "Korajn dankojn, ke vi ekveturigas por ni la vagonaron antaŭtempe! Tio vere estas..."

Liu Jufong donis al ili sian monon kaj diris: "Prenu kun vi la monon por eventuala bezono en Pekino!" Kaj ankaŭ Sunĉjo kaj Liĉjo, servantoj de la stacio, donis sian monon al ili.

La varvagonaro ekkuris kiel ekspreso. Ĉiuj stacioj de la linio donis verdan signalon por ĝi. La trajnestro senĉese kontrolis la veturadon kaj konsolis de tempo al tempo la gepatrojn de la malsana infano; la fervojistoj de la linio rapide kaj bone plenumis sian laboron; la lokomotivistoj kaj hejtistoj laboris intense.

Je 10 minutoj post la dua en tiu nokto, la malsana infano jam estis sendita en la hospitalon. Ĉar, post ekiro de la vagonaro, kamaradoj de la trajnoekspedejo

de la pekina stacio jam sciigis la aferon al la stacio kie la gepatroj devis elvagoniĝi kaj kamaradoj de tiu stacio petis ĈPLA-an trupon helpi per aŭto por sendi la infanon al la hospitalo tuj post elvagoniĝo.

Ankaŭ la Pekina Gongnong-bing-hospitalo faris preparon por savi la infanon. Hju Jinhiang, 64-jara specialisto de otorinolaringologio ellitiĝis tuj post informiĝo kaj haste venis al la hospitalo butonumante survoje. Ĉen Hjuande, la vicsekretario de la partia komitato de la hospitalo diris al la kamaradoj: "La fervojaj laboristoj portas al ni la infanon de tiel malproksima loko, ni nepre devas lin savi." Por ne perdi tempon, D-ro Hju atendadis en la operaciejo.

Kiam la malsana infano alvenis, la kuracistoj faris detalan ekzamenon kaj trovis ke lia gorgo ruĝiĝis kaj ŝveliĝis, lia korpo febris kaj la maizgrajno jam ruliĝis en dekstran bronkon. Komenciĝis la operacio. D-ro Hju lerte laboris per bronkskopo kaj atenteme elprenis la maizgrajnon.

La infano estis savita.

Post kelkaj tagoj, la gepatroj reiris hejmen kun sia infano. La avino de la infano enbrakigis lin kaj diris: "Mia nepo, mi ja ne atendis ke vi povas reveni viva..."

Ankaŭ najbaroj kaj kadroj de la produkta brigado kaj komunumo venis vidi ilin. "La infano estas savita dank' al la socialismo kaj la revolucia linio de Prezidanto Maŭ," diris iuj el ili. Por ke la infano ĉiam memoru feliĉan saviĝon, la familio decidis alinomi la infanon "Gingŝeng", ĉar li estis revivigita en Pekino, kvankam li ne naskiĝis en ĝi.

Ne Povas Sukcesi la Intriga

Plano de Hussein

POST zorgema konspiro, la reĝo de Jordano Hussein oficiale enpladigis sian planon pri fondo de la “Unuigita Araba Reĝlando” en la 15-a de marto, per tio li intencis nuligi la palestinan liberigan aferon, detruu la unuiĝon inter la palestina kaj arabaj popoloj kaj subfosi ilian batalon kontraŭ la agreso.

La plano pri la “Unuigita Araba Reĝlando” estas nur vario de la antaŭe elmetita “Reĝlando de Jordano kaj Palestino”.

Por nuligi la palestinan liberigan movadon, jam frue en 1968 la reakcia Hussein-registaro faris sekretan traktadon kun Izraelo, por fondi sur la okcidenta bordo de la rivero Jordan “Aŭtonoman Palestinan Regnon konservantan specialan rilaton kun Jordano”. En 1970, en sia parolo kun okcidentaj ĵurnalistoj Hussein esprimis ke, se Izraelo retiros siajn trupojn el la okcidenta bordo de Jordano, li volontos akcepti projekton pri “palestina internaciigo”, Jordano povas esti nomata “Reĝlando de Jordano kaj Palestino” kaj la sturmaj taĉmentoj povas “dividi ŝtatan rajton en la registaro”. Hussein diris ankaŭ, ke “ni povas marŝi al la direkto por fondi federacion”.

Laŭ raporto de la usona semajna gazeto *Times* en la 15-a de novembro 1970, Hussein havis plurajn sekretajn intervidiĝojn kun izraela vicĉefministro Yigal Allon ĉe la limo inter ambaŭ landoj. Hussein diris al Allon, ke li lasos Palestinon efektiviĝi ian aŭtonomecon sub lia regado, sed ne kiel sendependan Palestinon.


Antaŭ la 15-a de marto 1972, Hussein faris multajn sekretajn kontaktiĝojn kun izraelaj ĉefministro Golda Meir, nacidefenda ministro Moshe

Dayan kaj aliaj. Ili kune kovis en sekreto tiun planon pri la “Unuigita Araba Reĝlando”.

Post elmeto de la plano de Hussein, ĝi tuj renkontis fortan kondamnon de la Administra Komitato de la Palestina Liberiga Organizo, la Prezidanta Konsilantaro kaj la Nacia Asembleo de la Federacio de Arabaj Respublikoj, arabaj publikaj opinioj kaj la arabaj popoloj. La 18-an de marto, Yasser Arafat, prezidanto de la Administra Komitato de la Palestina Liberiga Organizo, malkaŝis en amasa kunveno de Mustansiriya-universitato en Irako, ke la usona registaro ellasis sugestiojn, antaŭ kiam Hussein enpladigis sian planon. Li diris, ke W. Rogers malkaŝis ke okazos ŝanĝiĝo en la regiono de Jordano kaj Izraelo. Post tio, la renegata reĝo Hussein elmetis la planon por ekstermi Palestinon. Arafat emfaze diris: “La oficiala proparolanto de niaj araba nacio kaj palestina popolo estas kanono.” Li sciigis al la aŭskultantoj, ke la milito kondukata de la palestina popolo “estas longdaŭra popola liberiga milito, kiun povas konduki nur veraj batalantoj, tiaj batalantoj persistos en batalo kaj kondukos la revolucion ĝis la fino sekvante unuj post aliaj.”

La 19-an de marto okazis kunveno de la Nacia Asembleo de la Federacio de Arabaj Respublikoj sub prezido de ĝia estro Khairy Al-Saghir. La kunveno esprimis sian plenan subtenon al la deklaro de la Prezidanta Konsilantaro de la Federacio de Arabaj Respublikoj pri rifuzo de la plano de reĝo Hussein.

En la Egipta Popola Asembleo, la egipta ministro de eksteraj aferoj Mohamed Mourad Ghaleb diris: “La celo de nia nacio estas liberigi la araban teritorion okupatan por ke la palestina popolo



Pli ol dek mil homoj de la siria ĉefurbo Damasko kunvenas por draste kondamni la planon de Hussein.

ĝuu sian memdecidan rajton sur la liberigita teritorio.”

En la 15-a kaj 16-a de marto, ĵurnaloj de Irako, Alĝerio, Egiptio, Sirio, Kuvajto, Libio, Libano kaj aliaj arabaj landoj unuj post aliaj publikigis ĉefartikolojn kaj komentariojn kondamnantajn ke la plano de Hussein estas plej granda perfido al la rajto de la palestina nacio kaj intencas nuligi la palestinan aferon. Libana ĵurnalo *Al Anwar* diris en komentario de la 16-a de marto: “Eraris tiuj kiuj staras post Amman kaj Hussein. Ili opinias, ke ilia intrigo povas sukcesi en la nuna situacio. Sed la palestina popolo, reprezentata de la palestina rezista movado, certe fiaskigos ĉiujn intrigojn kaj komplotojn.”

Studentoj kaj popolamasoj de arabaj landoj senĉese okazigis manifestaciojn kaj kunvenojn por forte kondamni la “planon de Hussein” kaj esprimi sian firman subtenon al la palestina popolo en ĝia armita batalo por liberigi ĝian hejmlandon. En la 18-a de marto studentoj de Kajro-universitato kaj Ein-Shams-universitato okazigis protestan kunvenon. Ankaŭ la Egipta Studenta Unio publikigis deklaron kondamnante ke Hussein kompletas kun Izraelo kaj la usona imperiismo por oponi kontraŭ la palestina afero kaj subfosi la batalon de la arabaj popoloj. En la 20-a de marto, manifestaciis pli ol 10,000 studentoj en Damasko, la ĉefurbo de Sirio. La studentoj laŭte kriis sloganojn, oponante kontraŭ la “plano de Hussein”,

kontraŭ la jordana reakciularo kaj kontraŭ la okupado de cionistoj.

La “plano de Hussein” estis forte kondamnata de la landoj kaj popoloj en la mondo, kiuj alte tenas kontraŭimperiisman kaj revolucionan standardon, subtenas justecon kaj amas pacon. La albana *Voĉo de la Popolo* kaj la korea *Labora Novaĵo* publikigis artikolojn, kiuj montris ke la intriga plano de Hussein ne povas sukcesi kaj la justa afero de la palestina popolo nepre venkos.

En la 18-a de marto nia ĵurnalo *Renmin Ribao* publikigis artikolon de komentariisto, kiu montris: “La ĉina popolo ĉiam subtenas la palestinan kaj arabajn popolojn en ilia justa batalo kontraŭ la usonaj kaj izraelaj agresantoj kaj ĉiam opinias ke la palestina problemo nepre devas esti solvita de la palestina popolo laŭ la deziro kaj interesoj de ĝi. Ĉia ajn forto ne povas bari la batalon de la palestina popolo por reveni al sia hejmlando kaj gajni la rajton de nacia ekzisto. Ĝi jam persistis en batalo de pli ol 20 jaroj. Ni profunde kredas, ke subtenate de arabaj popoloj, la palestina popolo certe povos venki la malfacilojn sur sia vojo, frakosas ĉiujn militajn subpremojn kaj ĉiajn intrigojn de politika trompo fare de la malamikoj kaj akiros la finan venkon.”

Nepre venkos la justa afero de la palestina popolo por oponi kontraŭ la usonaj kaj izraelaj agresantoj!

LA PALESTINAJ STURMAJ TAĈMENTOJ GAJNIS GRAVAJN VENKOJN

Laŭ la milita informo de la Ĝenerala Komando de la Palestinaj Revoluciaj Fortoj publikigita en marto, en februaro kaj la komenco de marto palestinaj sturmaj taĉmentoj senĉese atakis la malamikojn en la regionoj okupataj de Izraelo, brave rebatis kaj frakasis la armitan entrudiĝon de izraelaj agresaj trupoj en la sudan parton de Libano, ekstermis multajn vivajn fortojn de la malamiko kaj suferigis al ĝi gravan materian perdon.

En februaro palestinaj sturmaj taĉmentoj lanĉis pli ol 60 atakojn al la malamikoj en Golan-altaĵoj, Supra Galilee, la Gaza Zono, la okcidenta bordo de la rivero Jordan, valo Jordan kaj regionoj regataj de Izraelo. En tiuj atakoj la palestinaj sturmaj taĉmentoj ekstermis 130 malamikojn, detruis 21 tankojn, kirasaŭtojn kaj aliajn veturilojn, 24 kazernojn kaj militajn starpunktojn de Izraelo, atakis kaj bruligis 34 gravajn establaĵojn. Krome, la gerilanoj eksplodigis arsenalon, atakis 10 duonmilitajn transloĝlokojn, kaŭzante al la malamikoj grandajn perdojn.

Angolaj gerilanoj brave surprizas koloniisman patrolon de Portugalio.



ANGOLAJ GERILAJ TAĈMENTOJ BOMBARDIS STARPUNKTON DE LA MALAMIKO

Laŭ la milita informo de la Angola Popola Liberiga Movado publikigita je la dua deko de marto en Lusaka, gerilaj taĉmentoj gvidataj de APLM gajnis novan venkon.

Je la 4-a de marto, kiam unu kompanio de portugala armeo ĵus atingis la fortikigitan punkton de la Okcidenta Lumbala, gerilaj taĉmentoj de APLM bombardis tiun malamikan punkton, mortigis 30 portugaliajn koloniajn soldatojn, detruis 4 kamionojn kaj multajn militajn establaĵojn. Sub la intensa bombardo la portugala kolonia trupo devigite forlasis la starpunkton kaj forkuris panike.

LA MOZAMBIKAJ PATRIOTAJ ARMITAJ FORTOJ SENĈESE DONIS PEZAN BATON AL LA MALAMIKAJ TRUPOJ

Laŭ la milita informo de la Mozambika Liberiga Fronto publikigita je la 16-a de marto, la Mozambikaj Patriotaj Armitaj Fortoj kaj milicanoj ekstermis nombron da portugaliaj koloniaj soldatoj kaj faligis unu aeroplanon en la provinco Kabo Delgado en januaro kaj februaro.

De la 3-a ĝis 20-a de februaro, gerilanoj kvinfoje faris sukcesajn embuskojn kontraŭ la malamikoj sur la ŝoseoj de Namossa ĝis Ancuabe, de Kinyanigaia ĝis Nande, de Macomia ĝis Chai, de Montepuez ĝis la haveno Amelia, mortigis 26 malamikajn soldatojn kaj detruis 5 militajn veturilojn.

Sur la Kovrilo:

“Ni amas purecon.”

Foto de Lej Lej

Sur la Dorskovailo:

Kolektado de drogherboj en bambuaro

Foto de Hjue Jing



EL POPOLA ĈINIO

人民中国报


Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 6 (167) 1972

Ĉefa Enhavo

Ekparolas Surdmutuloj	1
Por la Sano de Infanoj	5
Rememoro pri D-ro Norman Bethune	8
En la Hejmloko de Norman Bethune	15
Fruktoj de la Ĉina kaj Okcidenta Medicinoj en Kombino .	17
Laringa Protezo de Nova Tipo	22
La Ĉina Reprodukta Presarto per Lignogravuro	24
Ŝpardepono de Higu-kvartalaĵ Laboristoj	27
Jarfina Distribuo de Unu Produktogrupoj	28
La Pekina Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko en Konstruado .	31
Post Lernado en Kadrolernejo de la Sepa de Majo	37
Naĝa Sporto de Daŭgiaŭ-komunumo	40
Scienca Eksperimento de Poma Produkto	42
Porcelanaĵoj de Gingdeĝen	44
Vizito al la “Lando de Lagoj”	46
Gingŝeng	47
Ne Povas Sukcesi la Intriga Plano de Hussein	49



Arto sur Alumetujoj



